

Turka Stelo



SALUTON,

Komenciĝis la turisma sezono sub la ombro de kronviruso kaj ŝajne ĉiuj adoptis la pensmanieron, ke la kronviruso jam malproksimiĝas el nia vivo!

Nuntempe oni parolas pri la Delta variaĵo de la viruso, kiu estas eble la plej rapide disvastiĝanta, kaj kiu tre facile eskapas de la antibodiodoj kreitaj en nia korpo fare de la diversaj vakcinoj.

Kvankam la Delta variaĵo komencis furori sur la mondo ĵus aperis la Lambda variaĵo de la viruso el la latinamerikaj landoj. Kaj ni ankoraŭ ne scias kia, tia variaĵo estos.

Do ni devas pensi pri kiel kaj kial tiu viruso tiom rapide aliformiĝas. Certe la problemo estas la granda populacio de homoj, kiuj vivas sur nia planedo, kaj la kunvivado de ili unu tre proksime al la alia. Do tiel la viruso trovas la okazon aliformi sin al alia pli efektiva formo por si mem. Plue homoj kaj registaroj ankaŭ parolas pri forlasi la portadon de maskoj!

Ni ankaŭ pripensu pri tiuj, kiuj kontraŭstaras al la vakcinado. Estas vere, ke neniu povas devigi homojn vakciniĝi. Tio estas parto de konsitucioj kaj ankaŭ de homaj rajtoj. Sed tamen la afero prezentas mondvastan katastrofon kaj eble en la plej proksima tempo la ŝtatoj sekvos kun aliaj mezuroj.

En unu flanko estas tiuj, kiuj vakciniĝis por

protekti sin kaj la aliajn homojn, kaj en la alia flanko estas la kontraŭstarantoj al la vakcinado.

Do plej eble leĝoj kaj reguloj formiĝos, ekzemple al nepermeso de la nevakcinitaj homoj labori kune kun la vakcinitaj.

Tia diskuto jam okazis en banko de mia lando (Turkio), en kiu la administristaro pripensas ne permesi al la ne vakcinitaj dungitoj labori kune kun la vakcinitaj en la oficejo. Oni diris, ke kvankam tiuj ne estos maldungitaj, tiuj devas labori el siaj hejmoj. Kompreneble estos ankaŭ aliaj, ankoraŭ ne priparolataj konsekvencoj kontraŭ la ne vakcinitoj.

Do pli bone estus vakciniĝi, daŭrigi la portadon de masko, kaj plejparte resti hejme pasigante vian tempon legante nian revuon ! :-)

Bonan legadon al ĉiuj !

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Esperanto Tago	2
Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Tempo Sigelita	5
ZEŬSO (ZEYΣ)	6
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	8
Gubi La Virkato	9
La Kimero - Rakonto el la estonteco (14)	10
El la literaturaj paĝoj de MAS	10
Mensogulo	12
Mejlŝtono. Historia dokumento en kortuŝa libreto	13
Hajkoj	13
La Supozita Naskiĝloko	14
Ŝercoj	16
Krucvortenigmo	16
Porinfanaj Objektoj (1976)	17
Mirinda renkonto (9/10)	18
Funeralo	18
La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj(2)	20
La Blanka Fadeno	22
Se estus mi anstataŭ tiu	23
La Unua Libro	24
Lingva Diverseco	26
Ciklo kun Hori Jasuo	27
Arbara Aventurado	27
FREDDY, la katoŝtelisto	29
HOSHINO Tomihiro	31
Solvo de la krucvortenigmo	31
Facilaj rakontoj	32

Kursoj



En la 22-a de februaro okazis kunveno por konatigi Esperanton al nesperantistoj. Pro la kronviruso kaj kvaranteno estas neniu ebleco aktivi pri Esperanto lingvo. Ekde la 22-a de novembro ni komencis serion de retaj kursetoj, ĉiu 30 minutojn longa, ĉiusemajnaj, pere de google.meet, pri diversaj gramatikaj punktoj de Esperanto. Temoj kaj iliaj planitaj datoj estas la jenaj:

- 22/11 Akuzativo
- 29/11 Transitiveco
- 06/12 Parteciploj
- 3/12 Korelativoj
- 20/12 Prepozicioj
- 27/12 Sufiksoj
- 03/01 Refleksiva pronomo: Si

<https://edukado.net/kursejo?kid=27268>

Esperanto Tago

Mondaj solvoj
por mondaj
problemoj

ESPERANTO
por monda
kunlaborado

ESPERANTO-TAGO
26.07.2021

Lernu **Esperanton**, la mondan lingvon
por kunlaborado kaj paco

www.lernu.net • <https://wikipedia.org/wiki/Esperanto> • www.esperanto.org

Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



La 69a Internacia Esperanto-Sumoo De la 9a ĝis la 23a de majo 2021

1. Partoprenantoj: 338 el 32 landoj+ unu regiono

2. La tuta nombro de partoprenantoj ekde septembro 2009 ĝis nun 14 329 homoj (2009.9-2021.5)

3. Laŭlandaj nombroj : 1. Japanio: 64; 2. Francio: 39; 3. Koreio: 31; 4. Brazilo: 29; 5. Ĉinio: 27; 6. Pollando: 19; 7. Germanio: 15; 8. Rusio: 12; 9. Svisujo: 11; 10. Britujo: 10

4. Perfektaj venkintoj (15 venkoj): 302 el 338 (89,60%)

5. Kvanto de legitaj paĝoj: 20000 paĝoj. Unu partoprenanto averaĝe legis 55,87 paĝoj.

Nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.pl/>

Sumoo en Vikipedio:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>

UEA



N-ro 956 (2021-06-24)

Nitobe-Simpozio 2021

De 1996 la Nitobe-Simpozioj kunvenigas

diversajn spertulojn kaj aliajn koncernatojn, por ke ili preparolu aktualaĵojn de lingvopolitiko en internaciaj kuntekstoj. La serion oni nomis laŭ la japana internaciisto kaj diplomato Nitobe Inazō, kiu oficis kiel ĝenerala vicsekretario frue en la historio de la Ligo de Nacioj, kiam ĝi komencis studi lingvopolitikon eksplicite kaj je la internacia nivelo. [...]

N-ro 955 (2021-06-23)

Mesaĝo de UEA okaze de la Monda Tago de Rifuĝintoj, 20 junio 2021

[Sendita al EKOSOK, al la Departamento de UN pri Tutmonda Komunikado (UNDGC) kaj al la Konferenco de Neregistaraj Organizoj (CoNGO).]

Universala Esperanto-Asocio (UEA) salutas Unuiĝintajn Naciojn, la Altan Komisionon de UN por Rifuĝintoj kaj speciale ĉiujn rifuĝintojn okaze de la Monda Tago de Rifuĝintoj, la 20-an de junio 2021. La tago honoras la forton kaj kuraĝon de rifuĝintoj kaj tiujn kiuj helpas ilin kaj celas publikan konscion kaj subtenon al tiuj homoj, kiuj devis fuĝi el siaj hejmoj pro konflikto, persekutado aŭ naturaj katastrofoj. [...]

TEJO



28/05/2021

Partoprenu la Virtualan Kongreson kaj

mojosigu ĝian junularan programon!

La Virtuala Kongreso, kiu anstataŭas la nuligitan Universalan Kongreson de Belfasto, okazos de la 17-a ĝis la 24-a de julio 2021. [...]

14/06/2021

11 vortoj el la Esperanto-kurso en Duolingo kiujn eble vi ne konas

Ĉu vi lernas Esperanton per Duolingo? Eble vi aŭdis kelkajn vortojn tie, kiujn vi ne tuj komprenis. En tiu ĉi filmeto... [...]

14/06/2021

Verku por Tutmonda Egaleco

Jen du invitoj de la TEJO-Komisiono pri Talento, subbranĉo Tutmonda Egaleco! Ĉu vi ŝatus verki artikolon? [...]

20/06/2021

Monda Tago de Rifuĝintoj 2021


Antaŭ kelkaj semajnoj foto de Luna, juna hispana volontulo brakumanta migranton, estis disvastigita interrete kaj... [...]

21/06/2021

Iĝu komisiito por la ekstera agado de TEJO!

Ĉu vi ŝatus antaŭenigi la esperantistan junularan agadon ĉe la neesperantista publiko? Ĉu vi spertas aŭ ŝatus spertiĝi pri interorganizaj rilatoj? La Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO bezonas vin! [...]

Leteroj de niaj legantoj



Saluton,
Mi kore dankas pro la sendado de la la lasta Turka Stelo. Ni ree devas endome resti dum semajno pro novaj kazoj de koronaviruso en Viktorio - eble eĉ pli ĉar ĉiutage la nombroj de malsanuloj altiĉas - do mi povos almenaŭ per la menso vojaĝi legante la tekstojn de tiom diversaj landoj. Mi povos eĉ vojaĝi tra le tempo de Antikva Epoko ĝis hodiaŭ.

Franciska Toubale el Australio



Karaj, mian ĉiaman plezuron ĉiun monatonfinon, ricevante la novan numeron de TS, pliigis ankaŭ la apero de du kontribuajfoj el Albanio kaj Kosovo, respektive la eseajo de Adem Demaĉi kaj la rakonto de Adil Olluri. Certe ĝojiĝos ankaŭ la filo de Adem, Dr. Shqiptar Demaĉi kaj la verkisto promesplena Adil Olluri. Do vi meritas duoblan dankon de mi!

Ĝis,
Bardhyl Selimi el Albanio



Kiel mi jam diris koran dankon pro la artikolo pri Angel Arquillos, li estis tre kontenta pro tiu surprizo. Kaj kvankam vi devas jam havi tri artikolojn de mi por Turka Stelo, mi tamen sendas du pliajn.
Kore via,
Roland Platteau el Francio



Karaj!
Multajn dankojn pro via altvalorega revueto Turka Stelo. Ĉion bonan al vi, ĉefe bonan sanon al la sekvaj numeroj! Jam sur la unua paĝo atingis min surprizo, la komuniko de la bela tradukaĵo de doktoro profesoro Endre Dudich, la poemo de Tagore, kio aperis en la marta numero 2006a de NHI (Nordhungairia Informo), redaktita kaj verkita de mia edzo kaj de mi ĝis 2013. Ĝi estis malfunkciiĝinta pro miaj malbonaj okuloj kaj pro la rezigno de niaj korektantoj pro iliaj malsanoj...

Adri Pasztorlaszlo el Hungario



Belega. Bonega. Koran dankon.
Gairik Patranobis el Barato



Saluton estimataj,
Dankon pro la junia numero de Turka Stelo. Ĝi, kiel ĉiam, estas bona kaj interesa kaj mi amuziĝas legante ĝin. Hodiaŭ mi sendas ankoraŭ unu mian rakonton. Mi esperas, ke iuj legas ilin.

Amike,
Laimundas Abromas el Litovio



Tre karaj,
Namaste ! Saluton !
Mi elkore dankas vin pro la nova revuo de Turka Stelo tio kio ege ĝojigas min. Turka Stelo estas tre bona medikamento por Esperanta ĝardeno. Oni legante ĝuas sian vivon. Vi estas tre aktiva kaj daŭre laboras por Esperanto movado. Pro tio mi tre gratulas vin.
Fartu bone.
d-ro **Mukunda Pathik** el Nepalo



Mi ĉiam regule kaj siatempe ricevas la freŝajn numerojn de la revuo Turka Stelo kiujn tuj tralegas kun granda plezuro.
Traleginte mi ĉiam havas grandajn impresojn. Ŝajnas al mi ke mi interparolas kun la aŭtoroj vidalvide. Kaj kunvivas kun la personaro de la verkaĵoj. Traleginte ĉi ĉion en E-o mi sentas min en vera E-ujo. Kaj krom tio nia karega kaj altestimata amiko, ĉeforganizanto kaj redaktoro tre bele aranĝas la revuon. Ĝi ĉiam estas riĉenhava, interesa kaj alloga. Mi elkore dankas la organizantojn kaj redaktistaron de la revuo kaj deziras pliajn sukcesojn al ili ĉiuj!
Amike kaj altestime,
Gafur Mirzabaev el Uzbekio

11>>> eksciteblas de nenio kaj neniu. Jen li subite ekmutas kaj sekva demando, pli detala informpeto de ŝia flanko, ne okazas. La viro pagas ĉe la kelnero, kaj iom poste ambaŭ leviĝas. Kiam li tenas preta por ŝi la malfermitan mantelon kaj ili rigardas unu la alian, videblas en la okuloj de la viro senintenca, ne estingebila glimo de frivola kompatato.

(daŭrigota)

¹ *Botho STRAUSS (naskiĝis la 2-an de decembro, 1944 en Naumburg) estas germana aŭtoro de rakontoj, romanoj, dramoj, eseoj kaj filmscenaroj.*

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo

*** publikigita kun permeso de la tradukanto ***

Fonto: <http://vlutermano.free.fr/Strauss1.html>

Mi, mia patro, kaj la mirinda kosmo de la blankakurteno

Mi pensas, ke en mi infaneco, mi laŭvorte estis apartamenta knabo. Ni havis dometon, malaltan loĝejon, inter apudaj konstruaĵoj kaj mallarĝaj stratoj. Sed mia tuta infanaĝo, juneco kaj eĉ plenaĝeco kongruis inter ili. Tamen mi havis songojn, kiuj superis nian etan domon, atingi arbarojn, oceanojn kaj spacon. Miaj revoj ne povis kongrui en ĉi tiuj konstruaĵoj, stratoj, domoj. La du plej gravaj aferoj, kiuj ekbruligis ĉi tiujn revojn, estis kino kaj ludiloj en mia vivo. Ho, kaj ankaŭ la bildstrioj kaj la ilustraĵoj en la fabelaj libroj, kiujn mi admiris dum mia frua infanaĝo.

Estis du ludilbutikoj en nia strato. La unuan posedis Avo Murat, ni tiel nomis lin sed lia vera nomo estis Hristo. Li estis kalva viro, mi malklare memoras lian vizaĝon. Mi ŝatis la ludilan odoron de tiu butikoj - mi pensas, ke ĝi estis odoro el miksaĵo de plastaj objektoj. Kaj la dua, komence de la strato, estis la butikoj de Yalçın. Li estis pli juna kaj portis dratajn verda-brunajn okulvitrojn, kiuj tiam estis modaj. Yalçın estis juda. Mi ne scias, ĉu ĝi estis lia vera nomo aŭ lia alnomo. Ni kutimis eniri kaj eliri la butikon de Hristo pli ofte. Ni lin ankaŭ nomis Avo Ludisto. Li kutimis vendi maĉgumojn enhavantajn hologramajn fotojn de turkaj kinoartistoj. Mi supozas, ke la marko de ĉi tiuj maĉgumoj estis Melek. Artistoj sur tiuj fotoj palpebrumis al vi, kiam vi iomete skuis la fotojn. Plastaj stiriloj, glavoj, pistoloj, tomboloj, kaj aliaj skatoloj de tablo-ludoj estis en lia butikoj. Se mi bone memoras, Yalçın estis vendanta ilin pli multekoste.

Inter ĉi tiuj ludil-memoroj estis la ludiloj, kiujn mia patro alportis de siaj komercaj vojaĝoj, la plastaj kamionoj donacitaj post mia cirkumcido kaj la elektra trajno, kasteloj, etaj plastaj vakeroj kaj indianoj. Ni estis infanoj en apartamento, sed ni kutimis ludi diversajn aktivajn ludojn surstrate kaj en la parko de Cihangir, tuj sub de nia domo. Televido kaj kinejo okupis tre gravan lokon en miaj feliĉaj mez-klasaj jaroj de mia infaneco. Ni kutimis praktiki la samajn detektivajn seriojn, kiujn ni vidis en la televidilo, en la koridoroj de nia bazlernejo, dum paŭzaj tempoj. La patro de mia amiko Metin laboris ĉe la usona konsulejo. Metin kutimis alporti bonkvalitajn skribvarojn kaj kartonajn etiketojn al la lernejo, aĵojn kiujn ni ne povis trovi aliloke en la Turkio de la 70-aj jaroj. Lia patro prenis ilin de la konsulejo. Ni skribis rangon kaj nomon sur tiuj malhel flavajn etiketojn kaj fiksis ilin sur nia brusto. Estis la fruaj 70-aj jaroj.

Franca detektiva serio nomita "Halo Polico!",

produktita inter la jaroj 66 kaj 70, ankaŭ estis montrita en la unukanala turka televido. Ni kutimis imiti la heroojn de tiu tv-serio, kaj ni surhavis pistolojn kaj pistolujojn faritaj el-papero ĉirkaŭ niaj talioj. Mi estis inspektoro Leblanc, alia mia amiko estis komisaro Lambert, iuj el niaj amikoj estis la ŝtelistoj, kiujn ni postkuris. Persekutado, aresto, esplordemandado... Jen la mondo de imitado de infanoj! Ĝi estis kaj kinematografia kaj teatra mondo.

Ununura kanala nigra kaj blanka televido, en kiu estis nigra-blankaj porinfanaj programoj, malfermis al ni la pordon al buntaj mondoj. Tv serioj kiel Star Trek, Bewitched, Mission Impossible, The Fugitive, Space 1999 (Stela Vojaĝo, Sorĉita, Neplenumbla tasko, La Fuĝanto, Spaco 1999) kaj multaj kino filmoj.

La reganta kulturo sur la ekrano de mia infaneco kaj la blankakurteno (t.e. la kineja ekrano) estis la usona kulturo. Koncerne la filmojn, kiujn mi spektis kun mia patro, mi devas aldoni ankaŭ la francajn kaj italaĵajn vidajn mondojn al ĉi tiu kulturo. De Turka Kinejo, tiuj, kiuj venas al mia kapo estas la historiaj heroaj filmoj kiel Tarkan, Battal Gazi, Kara Murat, kaj la detektivaj filmoj de Cüneyt Arkin, la plej grava stelo de la Turka Kino (iusence, ni povas nomi lin la turka Alain Delon). Kune kun mia patro mi spektis liajn detektivajn filmojn nomitajn Cemil.



Ĉar mia patro estis ne laboranta dum semajnfinoj, ni kutimis iri multe al la kinejo kune kun li. Mi ŝatus spekti pli da vakeraĵoj filmoj. Li ankaŭ amis ilin, sed foje ĝi kondukis min al filmoj kun pli pezaj temoj por mia aĝo. La plej memorindaj el ĉi tiuj filmoj estis la francaj filmoj "La prezo de perfido", "La Virino-Buĉisto", "Murdo en Meksiko" (filmo pri la murdo de Trocki), "La Blua Barbo" kaj "La Ruĝa Balono".

"La Ruĝa Balono" estas mallonga sed tre >>>30

Tiu ĉi estas la kvindeka rakonto, per kiu estas kompletigita la unua volumo de tiu ĉi mia “Gemoj el la Helena Mitologia kaj Historia Trezoro”!

Ĝis nun ni parolis pri multo, precipe ni skizis la ordon, laŭ kiu la aferoj okazis en la morala mondo de la mita epoko. Multon ni diris pri herooj, pri duondioj kaj dioj, tamen ni diris nenion pri la komenco, pri la deveno



de la dioj kaj la surtera vivo.

Nu, unue regis eterna, malluma Ĥaoso (Χάος), kaj el tiu Ĥaoso, el la nigra mallumo, el la absoluta nenio elvenis ĉio!

Unue, el Ĥaoso estiĝis la majesta, plej granda diino, Gaja (Γαία), nome la tero, kiu donas vivon al ĉio kio kreskas kaj staras sur ĝi. Gaja etendiĝis, kaj etendiĝis, ŝi iĝis enorma, senfina kaj en ĝia interno, en senfina, neatingebla profundo, formiĝis la nigra Tartaro (Τάρταρος) kaj la eterna nokto. Tute poste, el Ĥaoso eliĝis la plej granda forto, la amo, tiu forto kiu estigas kaj donas signifon al la vivo kaj estas nomata eroto!

Kaj la mondo komencis ekzisti. El Ĥaoso naskiĝis la nokto sed ankaŭ la etero, la brila infinito, la lumo kaj la gaja, hela tago; kaj la tago iĝis amikino de la nokto kaj tiuj du komencis sian eternan postkuradon, la unu kursekvas la alian, en senfina, eterna ludado!

La ĉiopova Gaja estigis la senliman lazuran Uranon (Ουρανός), la ĉielon, per kiu ŝi tute kovris sin, kaj poste ŝi naskis la montojn, kaj subite, abunde ekfluis la senlima maro, kiu kovris la duonan parton de la kosmo.

Kaj Urano seks-kuniĝis kun Gaja, kaj Gaja naskis sep filinojn kaj ses filojn, la grandegajn Titanojn (Τιτάνες). Kaj unu el tiuj Titanoj, nomata Oceano (Ωκεανός) kuniĝis kun Tetia (Τηθύα) kaj generis ĉiujn riverojn kaj lagojn de la mondo, sed ankaŭ la nimfojn, diinojn de la maro, la Oceanidinojn (Ωκεανίδες). Kaj alia Titano, Hiperiono (Υπερίων) generis la sunon kaj la lunon, kaj Astreo (Αστράριος) generis la astrojn kaj la ventojn, kaj iom-post-iome ĉio ricevis sian lokon sur la senlima universo kaj la Titanoj plimultiĝis kaj plimultiĝis, sed ilia patro severe premegis, opresis ilin.

Gaja naskis ankoraŭ tri enormajn idojn, tri Ciklopojn (Κύκλωπες), estaĵojn kiuj havis unu solan okulon en la mezo se la frunto, kaj tri aliajn filojn, monstraspektajn, altajn kiel la montoj, kiuj havis po kvindek kapoj kaj po cent manoj. Tamen, la kruele trudordona, vera tirano de siaj geidoj, Urano, ne akceptis tiujn siajn filojn, do, li



enfermis ilin en la abisma ventro de Gaja. Tiu lasta, ne povante toleri tion, instigis siajn unuajn filojn, la Titanojn, ribeli kontraŭ sia rigora patro. Neniu aŭdacis fari tion, krom Krono (Κρόνος), la temerara plej juna Titano, kiu helpe de la patrino, ŝtelece eniris en la dormolokon de sia patro, kaj kiam tiu lasta kuŝiĝis, li surprizis, atakis lin kaj per falĉilo li batis kaj detranĉis liajn seksorganojn.

Parenteze ni diru, ke dum miloj da jaroj la homoj diradis, ke la seksiloj de Urano falis en la maron, en la regiono de la insulo Citero (Κύθηρα) kaj de tie ili estis fortrenitaj de la ondoj ĝis Cipro (Κύπρος), kaj tie, ĉe la bordoj de la granda insulo, el la ŝaŭmo kiun ili formis, eliĝis, ekaperis la plej bela figuro, kiun dia aŭ homa menso povas kapti, ekaperis la majeste bela virino, la splenda diino de la amo, kiu ricevis la nomon Afrodita (Αφροδίτη). Kaj tiun nomon ŝi ricevis el la vortoj “αφρός” (afros = ŝaŭmo) kaj “δύομαι” (diome = enesti).

Tiele la tiranio de Urano falis kaj Krono sidis sur la trono de la universo, li iĝis mastro de ĉio. Li iĝis absoluta mastro, tamen li ne sentis sin sekura, li timis, ke li havos la sorton de sia patro, li timis ke liaj gefiloj iam detronigos lin perforte. Pro tio, ĉiufoje kiam lia edzino Rea (Ρέα) naskis, li devigis ŝin liveri al li la bebon, kiun li tuj englutis. Tiele li englutis siajn unuajn infanojn, Hestian (Εστία), Demeteran (Δημήτηρ, Δήμητρα), Heran (Ήρα), Hadeson (Αΐδης) kaj Pozidonon (Ποσειδών). Rea, kiu, senigite je ĉiuj siaj infanoj multe suferis, en sia lasta gravediĝo kaŝe foriris, ŝi iris al Kreto (Κρήτη), kaj tie, en dista, nekonata kaverno de la monto Ido (Ίδη), ŝi naskis sian lastan filon, Zeŭson. Ŝi lasis la bebon al la prizorgado de fidelaj nimfoj, ŝi revenis kaj liveris al sia edzo vinditan ŝtonon. Krono, nenion suspektinte, englutis ankaŭ tiun sian lastan idon, kompreninte nenion.

Zeŭso, sur la kreta monto, en plena sekureco grandiĝis prizorgate kun amo de la nimfoj. Li viriĝis kaj iĝis belega, fortega, ĉiopova. Kiam li estis preta, li atakis sian senindulgan patron, li kaptis kaj unue



devigis lin vomis
sianj englutitajn
infanojn. Poste,
helpe de la
elliberigitaj siaj
gefratoj, forpelis
Kronon kaj
ricevis la
sceptron.

Krono,
petinte la helpon
de siaj fratoj, la
teruraj Titanoj,
kontraŭstaris al
la superregado

de Zeŭso. Tiele terura milito eksplodis. La Titanoj lokiĝis sur la monto Otriso (Ὄθρυς) kaj la dioj sur Olimpo (Ὀλυμπος).

Estis kelkaj prudentaj Titanoj, kiuj subtenis Zeŭson, kiuj ne partoprenis la militon aŭ staris ĉe la flanko de la dioj. Inter tiuj estis la unuenaskita Titano Oceano, estis ankaŭ Prometeo (Προμηθεΰς) kaj aliaj, tamen, tute strange, ĉe la flanko de la dioj staris ankaŭ la patrino de la Titanoj, Gaja, kiu instigis multajn siajn gefilojn ne partopreni la militon. Malgraŭ tio, la pli multaj Titanoj kontraŭstaris kaj furioze militis kontraŭ Zeŭso. Kaj la milito estis tre forta, persista, kruela!

Kiam la danĝero ŝajnis tre granda, Zeŭso, obeante al konsilo de Gaja, elliberigis el ties interno la terurajn Ciklopojn, kiuj, montrante sian dankemon, donacis al li la fulmon kaj la tondron, la nevenkeblajn armilojn de la direĝo.

La milito daŭris kaj daŭris, dume la dioj plimultiĝis, novaj fortoj aldoniĝis al la flanko de Zeŭso, tamen la Titanoj estis tre fortaj kontraŭuloj, ili amase falis, ili retretis, sed denove atakis Olimpon, la altan kaj majestan opidumon de la gedioj. Ne trovinte solvon, Zeŭso faris ion ankoraŭ, li elliberigis el la plejprofundo de la tero la cent-manulojn, la tri monstrajn idojn de Gaja, kaj tiam la milito iĝis nekredeble violenta. Tutaj montoj estis elradikigitaj kaj forĵetitaj kontraŭ la malamikojn. La tuta tero skuiĝis kaj ululegis kvazaŭ miloj da vunditaj enormaj bestioj. Flamoj kaj densa fumo, ne trapenetrebila mallumo kaŝis la ĉielon, la riveroj eliĝis el siaj fluejoj, kovris per nigra akvo la ebenaĵojn, la maro kirligadis, ŝaŭmegis, kovriĝis per brumo nepenetrebila, la tuta naturo perdis sian formon, sian konsiston kaj ekvilibron.

Tio daŭris longe, tamen, fine, Zeŭso venkis! Li kaptis kaj ĉenis la lastajn, savitajn Titanojn kaj enfermis ilin porĉiame en la abismo de Tartaro, kie la teruraj cent-manuloj gardas ilin sendorme, en senelirejaj karceroj.

Tamen, Gaja ne estis kontenta, ŝi ne povis akcepti tion, ŝi ne povis toleri la ideon, ke ŝiaj geidoj restos porĉiame en Tartaro. Ŝi klopodis, tamen ŝi ne povis ŝanĝi la severan decidon de Zeŭso, kaj tiam ŝi koleris, kaj ŝi naskis la Gigantojn (Γίγαντες)!

Tiuj novaj, preskaŭ cent, kontraŭuloj de la dioj estis mortemaj, ili havis formon homan, sed aspekton teruran; ili estis tre grandaj, pezaj, fortegaj, iliaj hararoj kaj barboj konsistis el senĉese moviĝantaj serpentoj kaj ilia korpo finiĝis je vosto de drako.

Eksplodis nova, ankoraŭ pli kruela milito. La helenaj montaroj ankoraŭfoje skuiĝadis, sanceliĝis, insuloj profundiĝis kaj aliaj ekaperis, riveroj superfluis, kovris la kampojn, la Egea Maro boladis, la tuta mondo ŝanĝiĝis.

La dioj de Olimpo, ĉiuj kune, eĉ la plej pacamaj el ili, sub la komando de Zeŭso sin ĵetis kontraŭ la novajn malamikojn. Estis bataloj amasaj kaj duopaj. Sur la unua vico estis Pozidono, Hefesto, Apolono (Ἀπόλλων), Helio (Ἥλιος), Dionizo (Διόνυσος), precipe la nevenkebla filino de Zeŭso Atena (Ἀθηνά), kiu batalis ĉe la flanko de sia patro, kaj kiu la unua mortigis la plej fortan Giganton, Palason (Πάλλας). Kiam ŝi faris tion, ŝi senhaŭtigis sian malamikon kaj per lia haŭto faris sian netrapenetreblan ŝildon.

La milito daŭris longe kaj iam estis disvastigita famo, kvazaŭ ia mistera orakolo, ke la dioj venkos nur se la militon partoprenos mortema plej temerara heroo, forta kiel la dioj. Tiam, Zeŭso alvokis sian filon, Heraklon (Ἡρακλῆς), la grandan heroon, kiu eniĝis en la batalon kaj kaŭzis nekredeblajn damaĝojn al la malamikoj.

Gaja, kiu sciis ke estas iu herbo, kiu povas savi la Gigantojn, komencis serĉi pri ĝi, sed Zeŭso, kiu eksciis tion, ordonis Helion (Suno) sin kaŝi, ne aperi, do, la nokto daŭris kaj daŭris, tago ne iĝis, ĝis kiam la dioj trovis kaj tute dertruis la herbon, la solan medikamenton de la Gigantoj.

Notindaj estas kelkaj duobataloj, kiel tiu de Heraklo kontraŭ Alcioneo (Ἀλκυονεύς), la militestro de la Gigantoj. La heroo ark-pafis kaj per siaj pezaj sagoj trafis la Giganton, kiu falis, sed ne mortis, ĉar kiel longe li staris sur la tero de sia naskiĝloko, li ne mortis, li restis vivanta. Pro tio, Heraklo fortrenis lin malproksimen kaj tie li mortigis lin. Zeŭso mem mortigis la reĝon de la Gigantoj Eŭrimedonon (Ευρυμέδων). Alia Giganto, Porfiriono (Πορφυρίων) arogis ataki la direĝinon, Heran, li sukcesis kapti ties vualon, li provis sin nudigi kaj seks-perforti, tamen fulmo, ĝustatempe ĵetita de Zeŭso tute bruligis lin.

Alian teruran Giganton, Enceladon (Εγκέλαδος), alfrontis Atena, kiu sukcesis ĵeti sur lin Sicilion (Σικελία), la grandan insulon. La kolero de la Giganto neniam

ĉesas, tial, de tempo al tempo li turniĝas kaj returniĝas, li klopodas elliberigi sin kaj li kaŭzas seismojn en la tuta regiono de Mediteraneo (Μεσόγειος).

Pozidono estis tiu, kiu, en la febro de kruela batalo, deŝiris parton de la insulo Koso (Κως), li ĵetis ĝin sur Poliboton (Πολυβώτης), kaj tiel estis aperinta la insulo Nisiro (Νίσυρος), sub kiu la Giganto ululadas kaj kelkfoje vomas lafon.

Alia terura Giganto, Peloro (Πέλωρος), ekĵetis kontraŭ Dionizon la monton Pelionon (Πήλιον) sed ĝustatempe la milit-sperta Areso (Άρης) trapenetris lin per sia ponardo.

La unu post la alia la Gigantoj falis. La pli multajn mortigis Zeŭso mem kaj lia filo Heraklo. En tiuj grandaj militoj Zeŭso pruvis ke tute juste li estas la reĝo de ĉiuj dioj.

La milito ĉesis kaj sereno regis sur la tero, la mondo iĝis denove ordigita tuto. Ĉio iom-post-iome komencis funkcii normale, bela lumo kaj vivo kreskis ĉie, la homoj kaj ĉiu vivanta estaĵo eliris el la kavernoj, la naturo floris, sennombraj koloroj ornamis la tutan mondon, kaj sur Olimpo, sur la restadejo de la dioj, Zeŭso, reĝo de la tuta mondo, estro de la dioj kaj mastro de ĉio vivanta, unue dividis la mondon, doninte la ĉefajn regtaskojn al siaj fratoj. Pozidono iĝis mastro de la maro kaj ties tuta mondo, kaj Hadeso, kiu pli poste ricevis la nomon Plutono (Πλούτων) iĝis reganto de la suba mondo, de la mondo de la mortintoj. Mastro de la ĉielo, de la tuta tero kaj de ĉio kreskanta, vivanta, estanta sur ĝi, estas la majesta Zeŭso.

Tamen, ĉefa tasko de la direĝo estas la prizorgado kaj regado de la homaj aferoj. Do, pri ĉio homa estas aparta dio - prizorganto. La dioj, multaj dioj kaj ĉiaspecaj diaĵoj, atentis kaj zorgas pri la homaj pensoj, sentoj, interesoj kaj okupoj. Ili protektas,

instruas kaj gvidas la homojn, ofte ili intervenas, ili korektas, ili pardonas aŭ punas erarojn.

Tamen, la homoj ricevas de la dioj, sed ili reciproke oferas al ili multon, ne nur sian adoradon, sian kredon, sindediĉon, obeon al religiaj postuloj,

ili allogas la diojn mem al la homaj sentoj kaj emoj, ofte al la homa vivmaniero. Tio ŝajnas stranga, tamen vere okazas, la dioj akiras homajn ecojn kaj karakterizaĵojn, ili ofte pensas kaj agas homdece. Zeŭso mem, la ĉiopova kaj ĉioscia mastro, plejofte estas ordinara viro, edzo, patro, amiko, amorphartnero, kamarado, sed ofte li estas edzo ne fidela, patro ne zorgema, amiko ne intima, amoranto ne amema. Ofte li kondukas friponece, ruze, malmodere, diboĉe, maljuste!

Tiele oni eble povas ekspliki kaj kompreni tion, kion kelkaj antikvuloj diris, ke la dioj formas la homojn kaj la homoj formas siajn diojn!

GEMOJ EL LA HELENA MITOLOGIA KAJ HISTORIA TREZORO

verkis **Spiros Sarafian** el Grekio
(elekto, aranĝo de bildoj, de Kostas Kiriakos)



Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo

-- el retejo OLE



Johan Hammond Rosbach
– klasika novelisto

La verkisto, kiun mi nun prezentas al vi, ne distingis sin per verkado de poemoj, sed per verkado de rakontoj. Lia nomo estas Johan

Hammond Rosbach, unu el la plej produktivaj rakontistoj, verkistoj de noveloj, en Esperanto ĝis nun.

Unue indas iom konsideri la diferencon inter novelo kaj romano. Ambaŭ estas image kreitaj verkoj en prozo. Ĝenerale oni povas diri, ke romano estas longa verko, novelo mallonga. Longeco tamen estas iom nekaptebla kriterio, ĉar noveloj povas esti eĉ ekstreme longaj aŭ tre mallongaj. Edgar Allan Poe, amerika aŭturo kaj majstro de la novelarto (1809-49), difinis novelon kiel prozan rakonton tralegeblan dum duonhoro ĝis unu aŭ du horoj. Novelo celas al unu klara efiko, sed tamen estas sufiĉe fleksebla por inkluzivi plej diversajn temojn: scenon, epizodon, sperton, agon, karakterizojn, konversacion, fantazion ... la eblecoj estas fakte senfinaj. Ofte simple rakonto estas preferinda por tia verkaĵo. Estas notinde, ke

grava kolekto de noveloj, originale verkitaj en Esperanto, aperinta en 1977, havas la titolon 33 rakontoj. Ni, do, nomu nian hodiaŭan verkiston rakontisto, ĉar lia verkaro ĉefe konsistas el mallongaj rakontoj, noveloj.

Johan Hammond Rosbach naskiĝis en 1921 en Tingvoll, municipo en Møre kaj Romsdal provinco, Okcidenta Norvegujo. Li mortis en sia 83-a jaraĝo, en 2004.

Li studis filologion en la Universitato de Oslo kaj poste vivis kaj instruis en Sarpsborg en sud-orienta Norvegujo. Li lernis Esperanton kiel junulo en 1938 kaj estis agema en la Esperanto-movado kiel lerta instruisto laŭ la instru-metodo de Andreo Cheh, kiel redaktoro de la revuo "Norvega Esperantisto" kaj kunredaktoro de internacia kultur-revuo "Norda Prismo". Li estis membro de Akademio de Esperanto. Sed unuavice li estas memorata kiel populara verkisto, kontribuanto al revuoj kaj aŭtoro de 11 libroj, plejparte kolektoj de noveloj.

Lia unua libro, Bagatelaro, aperis 1951. En antaŭparolo li skribis, ke la ĉefa celo de tiu rakontaro estas doni facilan kaj varian leg-materialon al samideanoj, kiuj ne plu estas puraj komencantoj. Tiu celo atestas pri la pedagogia sinteno de Rosbach, li celis kaj sciis esprimi sin tiel, ke ankaŭ novaj adeptoj de la lingvo facile komprenis. Tiu sinteno karakterizas lian stilon, ne nur en tiu lia unua libro, sed ankaŭ en liaj multaj novelaroj poste verkitaj tra la jaroj. Sed liaj verkoj ankaŭ atestas atentindajn literaturajn valorojn, kie elstaras akra observo-kapablo kaj varieco de temoj.

En lia dua rakontaro, Homoj kaj riveroj (1957), oni povas klare konstati la kutimajn fontojn de lia temaro. Unu estas la infan-aĝaj spertoj de la aŭtoro mem, alia estas fantaziaj cirkonstancoj kun sociecaj tendencoj, tria estas filozofiaj problemoj postulantaj meditadon. Estas menciinde, ke en unu novelo, "Fantazio", li faras interesan komparon inter romano kaj novelo: "Ofte oni diras, ke la vivo estas romano. La vivo ne estas sinsekvo de okazaĵoj elpensitaj; multaj malgrandaj epizodoj, kiuj tute ne apartenas al la medio de la romano, nek al la firma linio, la plano de la romano – Ne, la vivo ne estas romano. La vivo estas noveloj, skizoj."

Tamen, Rosbach havis la ambicion provi sian rakontan talenton je proza verko pli longspira ol estas la novelo. Lia romano, Fianĉo de l'sorto (1977) atestas, ke li estis kapabla ankaŭ pri tiu formo de fikcia prozo. Kvankam tiu romano havas strukturon similan al mozaiko, ĝiaj eroj kune konstruas akcepteblan tutaĵon, kiel ja indas ĉe

sukcesa mozaiko. Jam sep jarojn antaŭe Rosbach ja faris similan eksperimenton. Lia novelaro Disko (1970) enhavas 18 rakontojn, kiuj havas komunan kadron, aluditan de la titolo, kiu estas tiu de ŝipo, kiu siavice estas nomita laŭ Gronlanda insulo. Tiu ŝipo servas kiel punkto de eliro al la rakontanto en liaj kontaktoj kun diversaj lokoj kaj homoj dise en Eŭropo. Tiu ŝipa kadro tamen ne sufiĉas por kunigi la diversajn epizodojn en tian tutaĵon, kiu meritis la nomon de romano. Tial tiu verko devas esti klasigita inter la novelaroj.

Ne eblas komenti pri ĉiuj novelaroj de Johan Hammond Rosbach. Ĝenerale oni povas diri, ke ilin karakterizas flua kaj efika rakontado kaj simpla kaj klara lingvaĵo. Tial ili estas tre taŭga legaĵo por tiuj finintaj bazan studon de Esperanto kaj celas progresigi sian lingvan sperton. Lia lasta libro, Fajrejo (skizoj kaj noveloj) aperis en 2002, du jarojn antaŭ la morto de la aŭtoro. Per tiu libro li finis sian 50-jaran seninterrompan verkistan karieron en la Internacia Lingvo. Tia sindediĉo al nia originala literaturo meritis nian respekton kaj neforgeson. Mi ne hezitas diri, ke jam venis tempo agnoski liajn plej bonajn novelojn inter niaj klasikaĵoj.

de **Baldur Ragnarsson**

(Juna amiko, n-ro 126, decembro 2009)

Fonto: <http://literaturo.esperanto.net/tekstoj/ragnarsson/rosbach.html>

Gubi, La Virkato

Gubi, la virkato.

Volas kapti unu raton.

Kune kun iras frato.

Rapide kuras sur straton.

Survoje aperas danĝero.

Vidiĝas serpento kun miro.

Gubi saltas kiel Heroo.

Troe trompas la tero.

Gubi, neniam laciĝas.

Multo da energio li havas.

Jen marŝas jen kuras.

Kantas dancas kaj batalas.

Enirante la arbaron.

For de lia ĉambro.

Kaptas Gubi unu raton.

Donas ĝin al la frato.



Kiam ili revenas hejmen.

Patrino starigas ilin

eksteren.

Montras ŝin Gubi la


trezoron.

Akirita dum la tutan tagon.

verkis kaj sendis

Gairik Patranobis

el Barato



Incidento

Tiu, kiu sukcesas, ankaŭ havas multajn enviulojn. Tion ankaŭ spertis d-ro Mojo. Precipe post transpreno de la estrado de la sekcio por primatoj multaj esploristoj ne ŝatis la decidon, ke ilia ĉefo nun estis tiu nova doktoro. Plejofte ili ne kuraĝis malkaŝe prezenti kritikon. Nur malpublike oni ofte aŭdis, ke multaj ne povis alktimiĝi al la ideo nomi ĉimpanzan scienciston estro. La kontraŭuloj ankaŭ avide voris la ofte terurajn titolojn en la gazetoj. Multaj atendis nur, ke tiu d-ro Mojo iam farus gravan eraron.

Sed d-ro Mojo ne faris eraron, kontraŭe. Liaj sciencaj esploroj ricevis la plej altan laŭdon de ĉiuj fakaj rondoj. Ankaŭ ne plu estis problemoj en lia sekcio por primatoj. Ĉiuj ĝojis pri la sukcesa kresko de la ĉimpanza familio. La instituto povis jam liberigi plurajn simiojn en la naturon.

Nur iun posttagmezon okazis io. La deĵoranta bestozorgisto ne laŭorde fermis la pordon de la baraĵo. Kelkaj ĉimpanzoj uzis ĉi tiun okazon kaj eskapis kaj fuĝis tra la koridoroj. Bonŝance, krom du ĉimpanzojn,

ĉiujn aliajn oni rekaptis. Sed la du fuĝintoj sukcese atingis taŭgan embuskejon kaj komence restis netroveblaj. Oni povas imagi, kiaj gazetaj fraplinioj estis produktitaj pro tiu incidento:



FORKURO DE LA MONSTRO-SIMIOJ KAOSO EN LA SEKCIO DE D-RO MOJO ATENTU: LA KIMEROJ!

Tiaj kaj similaj raportoj fantomadis en la gazetaro. Komprenoble, kiel ofte, la artikoloj estis troigitaj kaj eraraj. La du fuĝintoj tute ne estis kimeroj. Kaj komprenoble ne ekestis kaoso pro la eskapo de du bestoj. Tamen la incidento produktis maltrankvilon. Dum spontanea kunveno kelkcentoj da homoj manifestaciis kaj marŝis al la instituto. Sur grandaj ŝildoj legeblis la postulo 'FERMU LA INSTITUTON!' Ankaŭ pri tiu demonstracio aperis longaj raportoj en la amaskomunikiloj. La rezulto estis eĉ pli longdaŭraj protestoj. Dum kelkaj semajnoj ĉiutage venis homoj al la instituto. Ili montris siajn ŝildojn kaj blokadis la eniron.

Ne helpis, ke post nur tri tagoj oni sukcese rekaptis la du fuĝintojn. La tumulto daŭre kreskis. Unu vendredon amasiĝis grupo da protestantoj, pretaj por uzi perforton. Ili furiozis al la instituto kaj tie malkonstruis preskaŭ ĉiujn instalaĵojn en la enirejo. Ili eĉ penetris en la sekciojn por musoj kaj ratoj. Feliĉe, ke la aliaj partoj de la instituto estis pli bone protektitaj. La polico rapide alvenis kaj tiel povis preventi pli malbonajn atakojn.

(daŭrigota)

verkis **Klaus Friese** el Germanio
(plumnomo Erik Tantal)

fonto: <http://esperanto-klaus.de/>

el la literaturaj paĝoj de
Monda Asembleo Socia (MAS)

tradukis Vilhelmo Lutermano el Kubo

Boto Ŝtraŭso 1: Pri amo

Historioj kaj maloj

Paroj, korpamikoj (daŭrigata)

Rilatoj

De tempo al tempo - nu, kiam ŝi emas, ŝi vizitas bonvestitan, fortikan bubon kaj tiu plej ofte disponeblas por ŝi. Ŝi ne bezonas pagi por tio. Ili estas korpamikoj.

Ili scias malmulte unu pri la alia, nenion iel profundan, pri la vivojo de la alia ĝuste tiom, kiom oni parolas dum cigaredopaŭzoj kaj poste facile forgesas. Tiel oni faras ĝin, precize kiel jam priskribite en mil magazinoj kaj eĉ rekomandite. Tiel modele du helpas unu la alian, kiuj preferas vivi solaj kaj senlige. Antaŭ la domo ŝi karesas la blankpantonan viron sur la vango. Tio aspektas mole kaj dankeme, vivosperte kaj ne frivole. Ampleksa gesto same pro la eta boneco kiel pro la multeco da



eliroj, en kiu intertempe okazas la amorado flanke de amo. Ĉi tie temas pli ĝuste pri liberaldemokrata institucio, sen ĥaoso kaj angoro, kie la amo estas subordigita al la bono, malsovaĝigita kaj dediĉita al la libereco. La angoro apartenas al la atomcentraloj. Neniu estas plu devigita elteni ĝin ĉe ĝia seksa fonto mem. Kaj multaj ŝajnas sukcesi provincigi la angoron, transloki ĝin.

Jam nur aŭdi ĉiam denove la vorton rilatoj, tio efikas malhelpa al manŝvitado. Sonante kiel komerca banalaĵo, ĝi provas artifice sobrigi la rilaton kun la profunda danĝero, kiu estas esence la amo por la komuna bono, kaj envoki kalkuleblon en sferon, kiu daŭre estas la plej praa, plej nepenetrebla kaj plej forvoranta de la homo. Povas esti, ke tion kun la tempo iomete ŝanĝos la regado de ĉio ebla, la totala permeso, la konsumo, kaj malfiksos kaj malfortigos ĉiajn ligojn. Kiel la homo sen historio ĝuas la fridajn enscenigojn de pasintaĵoj, la subitajn scenojn de Prusujo, de la Staŭfoj, de faraonaj tomboj, tiel poste la senaman homon emocios apenaŭ io alia ol la spurkonservado de la amo. Treege li ŝatus foje sperti, kia vere estis tielnomata erota aventuro, aŭ kiel efikis pasio grandiĝinta nur rompe de reguloj, moroj, rezistoj.

Por ni en la urboj, por ni moviĝemuloj, akcelitoj kaj miksklasanoj, la elekto de partnero decidiĝas en 'libera' ludo de altiraj kaj repuŝaj fortoj, tute laŭ emo kaj plaĉo kaj laŭ la oferto de ĉarmoj. Estas, kvazaŭ la erota realeco, la ekstera scenejo de la ŝanĝiĝantaj okazoj fariĝintus kompleta respegulaĵo de la animo mem kun ties konfuzaj, neordigitaj bezonoj kaj la amplekso da ĝiaj ambivalencoj. Neniam plu ni renkontos tiun homon, pri kiu ni tuj scias, ke tiu kongruas al ni kiel neniu alia, ke li estas la sola ĝusta. Por niaj vivoformoj, kiuj faros nin ĉiam pli sendependaj unu de la aliaj, sed ĉiam pli dependaj de la tuto, tia bela kor-trompiĝo neniel plu utilos kaj ni iom post iom perdos ĝin el niaj sentoj. La parolo de la ligiĝo, kiu baziĝas sole sur sento kaj ne plu bezonas porti komunan socian sorton, estas kompleksa jes-ne kaj ĝia nefendebila kerno estas amo-frido. Sole decida estas, kio momente plaĉas al la animo - kaj tuj poste jam ne plu plaĉas al ĝi, kiel sciante, ĉar ĝi estas ja la nesto mem de la maliĝo. La renkontiĝo okazanta en la kondiĉoj de la laŭeble plej granda ekstera libereco kaj senrespondeco, baldaŭ fariĝos turmentata viktimo de la devigoj, de la volupto- kaj detrukapricoj de la subkonscio. Sur tiu kampo, kie la socialaj aspektoj (konstruo de komuneco, reproduktado, transdonado de kultura heredaĵo ktp.) perdis sian regantan rolon, la kapricoj interrilatas senbride kun la okazoj, la eksteraj ĉarmoj, la novo kun la rapida ŝanĝo de la hejmo, kaj el tiu larĝa trafikfluo, kie io dezirata povas ĉiam provizore


unuiĝi kun la donitaĵo, neniam eĉ plejfirme promesita ligiĝo povos separiĝi. Tiu fluo trairas nin ĉiujn.

Vizito de M.

Vizito de M. Kvar jarojn post nia disiĝo ŝi reportas al mi libron kaj nun ree sidas, en novaj vestaĵoj kaj kun pli mallonga hararo, sur la sama fenestrobreto, sur kiu ŝi sidis ankaŭ dum nia lasta vespero. Senĝene ŝi tuj parolas 'pri ni'. Ke tiam mi estis elradikigonta ĉion pozitivan en ŝi. Ke mi esprimis min neniam alie ol malestime pri ŝia profesio, ŝia panjo, ŝia gusto kaj ŝia pasinteco. Neniam amlaŭdon, sed ĉian bagatelajon, pri kiu mi kulpis, ŝi ŝajnas konservi freŝa en sia memoro, kaj ŝi citas min laŭvorte. Ne tre amuzas tio! Tiaj reenkontiĝoj konvertu do la iaman doloron al nuna flirtado, al flirtado inter spertuloj. Sed kiom triviala kaj banala estas, nun diri tute trankvile kaj malkaŝe, kion oni tiam eligintus nur kun paniko kaj paliĝo. Ĉu eble la tutan tempon ŝi pensis pri mi nur en tiu formo de senviva regulado de kontoj? Se ni ne estus disiĝintaj, mi vidus en tio la plej validan motivon por disiĝo: ke ŝi ne kapablas memori nin dolore kaj larĝanime. Mi repuŝiĝis, kiam ŝi adiaŭe subite kisis min. Neniam plu! Neniam plu vi!

Ba!

Distrikta funkciulo inter tridek kaj kvardek jaroj antaŭ sia pigre kaj mute sidanta edzino varmigas sian inteligenton. Li ĵetas kritikan lumon sur certaj profesiaj okazintaĵoj, ja li leviĝas al distanca observanto de la propra ofico, nun vespere en la kafejo ĉe nokta drinkado. Ĉar ne eblas atendi de ŝi objekton kaj ankaŭ ne rigardon travidanta lian ridindecon, li rakontas ĉiam pli intense kaj ĉiam pli fanfarone pri la misoj en la administrado kaj pri kion li intencas fari kontraŭ tio. Kaj dum li tiel sole parolas kaj bezonas atenti neniun, li sentas sian inteligenton konstante pliiĝi, kaj la kompreno de la interligiteco ebriigas lin. Jen subite venas ankaŭ bildo de lia edzino en liajn okulojn; por sia propra kontentiĝo li bezonas ŝin iom pli saĝa ol ŝi estas, kaj li imagas tion. Tiom sendanĝere apartena, kiel ŝi sidas antaŭ li, tiu homo estas la plej bona drogo por pensi sin alten. Tamen ŝi de tempo al tempo malkaŝas per malĝusta vortkompletigo, kiom malbone ŝi sekvas lin, kiom fore ŝi estas de lia 'ondolongo' - manko en la partnereco, pro kiu la juna oficisto jam interrompis pli ol unu altoflugon kun amara bedaŭro. Li (kritikante la oficon): "Kiom tio kostas al la impostpagantoj!" Ŝi: "Ĉu oni do ne havas alian postenon por prizorgi tiun aferon?" Li: "Ba! Imagu nur, kiom tio kostas al la impostpagantoj!" Kaj tion li diras kun pli da emfazo, preskaŭ indignite, por ke la edzino fine kun-ekscitiĝu. Sed ŝia naturo ne ebligas tion, ŝi



De malproksima lando post' reven'
 Nobelo iu, dum promen'
 Kun la amiko en la kampo vasta,
 Rakontis pri vojaĝ' en ton' bombasta
 Kaj multe li mensogis dum rakont'.
 "Ne vidos mi, sendube, en estont'
 Similajn aĵojn de vojaĝo lasta.
 Vetero via estas sen preciz':
 Jen tre malvarmas, jen varmeg' kruelas,
 Jen mankas sun', jen ĝi tro brile helas.
 Sed tie estas vera paradiz'!
 Ilia viv' ĝis nun al mi impresas!
 Nek palto, nek kandel'! Ja ili ne necesas.
 Forestas tie nokto kaj malklar',
 Kaj regas maja tag' dum tuta jar'.
 Kaj en laboro oni ne fervoras,
 Sed se vi vidus, kio kreskas, floras!
 En Romo la kukumo estas glora
 Ho, mia Dio plen-favora!
 Ĉu kredas vi tutplene al rakonto?
 Ĝi estas granda kiel monto!"
 "Mirindas certe!" diris la amiko:
 "Mirakloj estas ĉie sur la ter',
 Sed ni ignoras ilin en praktiko.
 Jen havu vi ekzemplon de mister':
 En nia lando estas ĝi uniko
 Asertas mi precize, kun sincer'.
 Jen vidu ponton larĝan sur river',
 Ni iras tien. Simpla laŭ ekster',
 Sed tre mirinda, oni devas diri.

Nek unu mensogul' kapablis ĝin trairi;
 En mezo de la pont'
 Trafalas li kun hont'.
 Sed homo, kiu veron ŝatas,
 Sur tiu ponto iras kaj bonstatas."
 "Ĉu la trafal' minacas per danĝer'?"
 "Profundas la river'.
 Jen kia mirindaĵ'. Kaj tion mi konstatas.
 Do kvankam grandas la kukum' en Rom', —
 Al monto, diris vi, similas la legom'..."
 "Ne, ĝi ne estas mont', ĝi larĝas kiel dom'."
 "Miraklo granda!
 Sed samas ponto nialanda,
 Al kiu iras ni. Vi kredu sen demando,
 Por mensogul' fatale ĝi funkcias.
 En la printemp', dum iu hor',
 Trafalis de la pont' (la tuta urbo scias)
 Du ĵurnalistoj kaj tajlor'.
 Sendube, la kukum' kun dom-aspekto
 Miraklo estas laŭ grandec-efekto."
 "Ne estas ĝi miraklo por respekto,
 Kaj en konkludo vi malpravas:
 Domegojn Romo ja ne havas
 Kaj tie nur domaĉoj ordinaras,
 En kiuj homoj du apenaŭ staras
 Au sidas en mizer'."
 "Ĝi estu tiel, tamen mi konfesas,
 Ke la kukum' mirindas sur la ter'
 Se homoj du okupi ĝin sukcesas.
 Sed kiel lerta estas nia pont'!
 Apenaŭ mensogul' surpaŝas ĝin sen hont'
 Trafalas li senpere.
 Kaj kvankam la kukum' mirigas nin..."
 «Atentu!» Mensogul' avertis lin:
 "Anstataŭ tiu pont', transvadu ni prefere."

verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio
 tradukis **Sergej Grigorjeviĉ Rublov** (1901-1979)
 Ukrainio

32>>> bedaŭrinde ne trovis afablan akcepton.

Fine el Lhotka ŝi venis al Skokovy, kie oni konstruis domon por torfkuracado. Kvankam ŝi havis problemojn pro envio kaj malfavoro de administraciaj oficejoj, ŝi plu akceptis ĉiujn turmentatojn kun zorgo kaj bonkoreco. Plejparte ili resaniĝis.

La torfkuracejo kaj akvokuracejo ĉesis funkcii post la dua mondmilito.

Restis nur loka proverbo: „Se avulino ne helpas, ŝovelilo atendas“.

La tombo de la avulino estas en proksima vilaĝo Všeň.

Nun en Skokovy-n venas esperantistoj por ekzerci sian lingvokapablon, komune amikiĝas, helpas unu al alia, promenas en la saniga naturo de Ĉeĥa paradizo... sub protekto de MUDr Josefo Hradil.

Fonto: Legolibreto 2 de Jindřiška Drahotova

Mi trovis hazarde kadre de brokantaĵoj Esperantan libreton ege kortuŝan, kaj ne nur ĉar ĝi estas dediĉita de iu al iu, ambaŭ mortintaj nun:

«Se vi legas en ĝi rememoru, ke mi estis ĉe vin kaj, ke la feliĉo favoris min konatiĝi kun vi. Espero, Efektiviĝo, Songo Otto 20/6/1926 - 29/6/1928 la 12/8/1928»

sed ĉar tiu libreto moderna (kun veraj fotoj sur brilpapero, kiu estis tehniko nova) kaj optimisma, parolis nur pri espero paco kaj futuro : gi estis eldonata en la printempo 1914...

http://www.ipernity.com/doc/roland_gerard/50739470

sed ankaŭ tre interesa, multteme !


Ĝi estas libreto kiu prezentas (kaj tamburas!) la multaktivecan urbon Leipzig (Leipsiko) kaj inter la multajn pripentindajn aferojn, kiujn oni malkovras en ĝi estas io, hm, tre aktuala !


Ĝi memorigas al ni, ke ĝis tiu epoko, inkluzive, kuraciloj (drogoj) egalas kuraĉerboj ! (legu dekstren)

Sed ĝi ankaŭ estas historia! Ĉar de tio estos baldaŭ la fino! Post la milito la ĥemiaj firmaoj komencos vendi tiujn ĥemiajn molekulojn, kiuj anstataŭigis la kuracherbojn, kaj kreos tiun fian kapitalisman (kaj kriman) enton nomitan angle Big Pharma (kaj Esperante Farmafio!), John Le Carré, kaj nun ni ĉiuj, bone scias pri kio ĝi kapablas. La libreto nin anoncas, do en 1914:

«Germanio pro sia estreco en la fabrikado de ĥemiaĵoj iam provizos al la tuta mondo medikamentojn»

verkis kaj sendis **Roland Platteau** el Francio



Ĉambro plafona – Sur la fenestra steloj. Kaŝrigardas lun´.	Mildaj manplatoj – ĉirkaŭprenado de infan. En okuloj stelojn.	Aromlavando. Matena bonodoro. Senso pri virino!	 <p>verkis kaj sendis Ivaniĉka Maĝarova el Razgrad, Bulgario</p>
Maldolĉa gutoj mian vizaĝon kisas. Nokto soleca.	Ne kredual nokt´ Denove ĝi ja fajlos. Amo doloras!	Bordo dezertas – nur revoj altrondflugas. Mildajn memorojn.	
Malnova albumo- reviviĝas momentojn. Memfot´ en telefon´.	Noktsunsubiro – vojaĝo al revoj. Ĉarma tuŝeto.	Soleca bluso en mia anim´ flugis. Eterna Amo !	
Konvalinkoj – en ĝarden´ aroma son´ Novedzinbuked´	Paperarko min- al infanec´ revenas. Memor´ al panjo.	Oranĝa floro en fraulinhararo. Eleganteco!	

-- Rakonto de **Zija Ĉela** el Albanio

Langvorinte kelkajn jarojn surlite, finfine ŝajnis ke alvenis la mortomomento al Cam. La korpo estis elĉerpita, dum la spirado nur postsignis sur la spegula surfaco. Tamen, li ankoraŭ ne forpasis. La cerbo foje falis en la mallumon, foje alportis vicvice kvazaŭ en filmo neforgeseblajn vidaĵojn el la arbareto de Kalumi. Dum iu somera tago, li estis vidinta junan virinon kiu estis preterpasanta fronte al li, vestita malpeze, kun grandaj mamoj, transpasante ŝtonŝtone la torenton, kiuj lumbrilis kiel silkaj fadenoj kaj pliardigis la haston por eniri la arbareton. En la fronta piedirejo, atendante soifplena, staris ĉarme plensana viro kun la kostuma kompano granadkoloro, broditaj subjako kaj pantalonoj.

Surprizita kaj ne sciante kial, Cam Alcani estis kapturita al la monteta supro kie briletis la preĝeja kampano, poste al la deklivo kun paŝtejoj, poste al la kverkujo kaj arbustujo, ĉie ajn estis la blankulinoj kaj lunuloj, ĉar en la vilaĝo nomis la virŝafojn kaj virkapojn bredataj por kopolacio lunuloj, ne plu kampaniŝafo. Post momenteto, al la viro ŝajnis ke fulmis sekvetere, kelkaj flamtufoj eksplodintaj fluge forbruligis ties vizaĝon kaj li, ŝokita kaj kortremante, kovris la okulojn per la manplatoj. Kiom tio longis? Ĝuste ĉi tie la vidaĵoj malaperis kaj la cerbo eniris denove en la mallumo.

La singultoj de la mortonto ne ĉesis, neniu komprenis en kiu loketo aŭ kaŝanguleto sidis lia spirito, tial ili ekprovis ĉion konsilata de la moro por tiaj kazoj. Ili proponis al la forpasonto unue konduki lin per la moviĝanta lito. Laŭ iu malnova rito, kiam kelkiu estis apud la morto kaj ne povis ellasi la spiriton, oni lin surmetis en la moviĝanta lito kaj promeniĝis ĉirkaŭen, por ke li adiaŭu la naskiĝlokon. Sed la aĝulo koleriĝis kiam oni menciis al li tion. Tiam, por plifaciligi la morton, la familianoj, la edzino, la filoj kaj novedzinoj, filinoj kaj bofiloj, alvenis laŭvice en la langvora ĉambro, fleksiĝis sur ties kapon kaj aldiris ke ili jam pardonis lin pro kiu ajn eraro aŭ peza kulpo kaŭzinta ilin de li dum ties longa vivo. Post kiam finis la omaĝon la hejmaj membroj, la samon faris ankaŭ liaj gefratoj, kiuj alvenis el ties hejmoj. Poste ĉiuj atendis ke li mortu. Sed la avo Cam denove ne senviviĝis. Tiam oni plilarĝigis la cirkon kun gekuzoj laŭ la patra kaj patrino linio, sed nek ties pardonemo ne helpis lin forpasi. Do, oni invitis alveni ankoraŭ pli malproksimajn konatulojn, baptopatrojn, amikojn kaj bondezirantojn aliajn, esperante ke la kunfunkcio restinta en lia koro nelasanta lin morti, troviĝus ĉe iu el ili. Denove neniu helpis la aferon, ne ebligis la aĝulon eterne dormi. Je

diablo, la maljunulo ie estis hokita, sed en kiu najlo do, pri tio neniu povus diveni.

Dum la suferado daŭris kaj la filoj insistis ĉe ties kapo, Cam Alcani sukcesis elbuŝigi vorton deziratan. Por plenumi la lastan ties deziron, ili tuj forkuris al la adreso avertita de patro. Sed ĵus la viro alvokita eniris la ĉambron kaj malfermis la preĝlibron kaj komencis kanti La Ilahe il-lallah, la maljunulo kolektis la fortojn kaj kontraŭstaris:

-Ne la mulaon, sed Hosha-n!

Pro tiu stranga demando, ĉiuj en la ĉambro restis ŝokitaj. Sed la ekleziulo edukita ne ofendiĝis, li diris ke la homo havas sian spiriton tie kie li havas la okulon.

Kion fari nun? Neniu kuraĝis aliri ĉe Radi de Zarish kaj aldiru ke Hosha-n, ties belan edzinon, plej belan en la loĝkvartalo de katolikuloj, por kiu la edzo estis minacinte per fusilo por edzinigi ŝin, la maljunulo Cam ege avidis kaj postulis ke oni venigu en la ĉambron, eĉ li sidu kun ŝi solsole en la ĉambro!

Radi, la severa sentima edzo, estis aranĝinte la nuptofeston naŭ jarojn antaŭe kaj la hejmuloj rememoris ke ĝuste ekde tiu tempo, la maljunulo Cam estis suferante surlite kaj ne plu elirante sian hejmon. Ĉiuj rememoris, ankaŭ, ke en tiu nuptofesto li estis kantinta por la lasta fojo, kvankam multaj ne priatentis tion aŭ estis mokinta lin. Kiam la belan Hosha-n, vestite kiel novedzino, oni estis sidigintaj en la korto kaj la viroj okupis lokojn ĉe la manĝotabloj, la muziko estis ĉesinta iomete, por ke lasu la virinojn ekdanci, en la silento de tiu ĝenerala scivolema admirado, subite aŭdiĝis vira voĉo. Ĉiu kapturita al ties direkto kaj ĉiuj vidis la avon Cam ludante pasiege kun sia ĉiftelio (muzikilo dudrata), dum ties dentoj kun platinaj protezoj briletis kvazaŭ fajraj flugiletoj en la malfermita buŝo. Laŭ la kanzono komencita, Cam Alcani ne troviĝis en la korto, tion la vortoj de klarigis, sed li diris nur tion kion vi vidis:

Ooo

*Kiam la cicoj ludis subrobe,
la kampaniloj faris drang kaj drang..
Povrulo mi, povrulo!*

Ooo,

*kiam transe la kostuma kompano elvolviĝis,
mi interdente diris ke la tero estis fendata..
Povrulo mi, povrulo!*

Ooo,

*Kiam min blindigis kelkaj fulmoj,
femuroj kaj cicoj eligis ekbrilojn..
Povrulo mi, povrulo!*



Ooo,
mi kapdecidis min mortigi,
dum cent jaroj vin ne plu vidi..
Povrulo mi, povrulo!..

Nature, la nuptofestantoj havis diversajn kialojn por amuziĝi, des pli ke ĉi tiu kanzono estis tiel malnova, kiel neniu plu konsideris, aŭ ĝi estis tiel nova, ke neniu povis perkerigi.

Tamen, unu el la viroj ĉebrake, aŭskultinta lin scivoleme, konfirmis ke ĉiujn aliajn vortojn li estis kompreninta, nur unu kozo ne estis klara por lia cerbo: "Bone, tiu stultulo sin mortigos pro frenezeco, sed kiel li povos vidi la okulojn de tiu ceterulino post cent jaroj?!". Avo Cam rediris: "Interne la tero estas malluma kaj fertila kiel la virina ventro, tial la semo burĝonas tie. La vivo nin disigas, dum la tombo...".

La virinoj komenciĝis danci kaj ne plu silentis por ke oni finu la respondon, ĉar oni scias ke la birdoj en la dornejo, la ĉevalinoj en la draŝejo kaj virinoj en la dancejo neniam laciĝas.

Tamen la stultaĵo de la maljunulo, kvankam estis priparolita tiujn tagojn, finfine forgesiĝis.

- Avo Cam,- demandis la pliaĝa filo,- se ni venigos ĉi tie Hosha-n, ĉu vi pretas tiam forpasi?

- Jes, mi forpasos,- supozis li.

- Nur ne troigu! Se vi ofendos la fremdan virinon kaj hontigas nin, mi mem mortigos vin.

- Mortigu min,- permesis la avo sian filon.

Tiel estis farite, helpe de iu bofratino, oni anoncis Hosha-n. Nun ŝi fariĝis tridekjara, patriĝis, sed tamen estis bela samkiel la tagon de la nuptofesto. Oni parolis ŝin pri la nediskutebla deziro de la maljunulo, certigis ŝin, ke oni ne hontigus ŝian edzon, eĉ ili pretis revenĝi mem, starante postporde kun la fusilo enmane. Kaj Hosha konsentis.

Enirinte la ĉambron, al la virino ŝajnis ke la maljunulo estis dormanta. Alproksimiĝinte, ŝi vidis la okulojn malfermitaj. En la okuloj ŝi konstatis froston kaj nebulon. Ŝi elnebuligis lin ridante:

- Ĉu vi alvokis min, stultulo?

- Jes, mi alvokis vin, Hosha, kaj ege dankemas vin pro la alveno. Ĉu ni estas solsole nun?

- Solsole ni estas,- diris la virino,- mi ĵus enŝosis la pordon.

- Nu, bone, Hosha,- kontente diris la aĝulo, - nur unu pordo neniam fermiĝas, tiu de la morto. La homojn disigas la vivo, dum la tombo intermiksigas ilin. Kiel vi opinias, ĉu tiel?

Hosha konsentis ke la morto estas tamburo po kapo kaj aldonis:

- La tombo kunigas ilin. Post cent jaroj, eble ankaŭ transe oni saltos de tabulo al tabulo. Malpeze, kion diru, ŝtonon post ŝtono, tra la torento.

- Eee,- forte kontentiĝis la maljunulo,- vi jam rememoras, de ŝtono al ŝtono. Vidu, vidu, eĉ la roso ankoraŭ ne surfalis al via menso, Hosha!

Poste, li sobris, ĝis kiam ŝajnis ke li falis en la deliro. Li kuŝis surdorse kaj kelkajn fojojn li klopodis kaptuniĝi al Hosha, sed la kolostoj ne obeis. Nek tiam, kiam Hosha klopodis tion fari mem. Eble la tuta korpo de la aĝulo frostiĝis. Ne, unu brakon li povis movi malrapide. Ĝuste tiun brakon li etendis je ŝia direkto kaj pene, sukcesis enigi la manon subroben. La virino tremiĝis. Por ke ne ekrii, ŝi mordis sian lipon. Poste, vidante liajn spasmojn, ŝi demandis:

- Ĉu vi volas ke Hosha levu la robon?

- Ne, ne,- li diris, - la kurteno estas falante, ne estas leviĝante, Hosha.

Post momenteto, la malmola mano daŭrigis grimpi laŭlonge de ŝiaj femuroj, iom post iome, ĝis kiam la manplato ektaŝis la ventron. Denove Hosha ekstremis, sed ne kriis, nek moviĝis.

Ankaŭ la maljunulo tie haltis.

- Avo Cam,- voĉdiris ŝi.

Li respondis per la fingraj palpoj. Komence li karesis la fermitan krateron de la umbiliko, poste la tutan ceteran spacon, facface kaj kulminkulmine. Liaj okulaj ĉapetoj estis kunigitaj, la makzeloj estis ŝtoniĝantaj, li eksentis ankaŭ la ŝtoniĝadon de la brako kaj volis ion eldiri. Sed li konsentis la kontraŭon, pli bone la mano elglitu, ol la buŝo. Kaj la mano elglitis. Ĝi elglitis senvive sur la fronta deklivo de la Venusa Monteto kaj atingis la poluritan rampon, floriĝinta per brulaĵo kaj muskaj harplektoj.

- Nu?- aŭdigis la voĉon la viro postporde, la junulo kun la fusilo enmane pretpreta interveni.

- Jam li mortis,- anoncis lin Hosha.

- Ĉu li diris ion, kiel lastan parolon?


- Nenion. Nur, antaŭ ol morti, li iel soifestingis sian nostalgion pro la naskiĝloko. Iamfoje la maljunuloj kondutas kiel infanoj.

La entombigo okazis la morgaŭon. La ĉeestantoj, ankaŭ postkiam la mulao kantis la porkazan paroladon kaj la tombo kovriĝis, atendis momenteton tutanksie, kvazaŭ la tero povus moviĝi. Sed la ekleziulo trankiligis ilin: " Ĉi tiu povrulo ege suferis, mi scias tion! Sed kiu ajn li estis, mi kredas ke nun li estas mortinta."

Zija Ĉela
Tirana, 1998

Enesperantigis kaj sendis **Bardhyl Selimi** el Albanio

Ŝercoj



PERFEKTA PICO

Jozefino preparas ion en la kuirejo.

Kruko: Kion vi preparas, karino?

Jozefino: Temas pri senglutena,

senlaktaĵa, sensakarida pico.

Kruko: Ĉu vere? Mi vidu.

Li rigardas la teloron de Jozefino: Sed tio estas nur tomatotranĉaĵoj.

Jozefino: Jen.

KALKULKAPABLA

Eta Joĉjo venas en la sidoĉambron kun sia hundo:

Vidu, paĉjo, mi instruis al Bojboj kiel kalkuli!

Kruko: Ĉu vere?

Joĉjo: Jes. Li boas la rezulton.

Kruko: Montru.

Joĉjo: Bojboj, kiom estas unu plus unu?

Bojboj: Boj boj boj.

Kruko: He ja, unu el vi estas malbona matematikisto...

KIA ESTAS LA VIVO?

Adoleska Amando diras al sia frateto, Joĉjo: Vi estas tro juna por scii kia vere estas la vivo!

Joĉjo: Nu, mi simple demandas al paĉjo kaj panjo.

Amando: Ho, ili estas tro maljunaj por scii!

tradukis **Rikardo Cash** el Francio
publikigita kun lia permeso

Fonto: esperanto-anekdotoj@googlegroups.com



FLAVA FRAGO

SAFELY ENDANGERED

Silaba Krucvortenigmo



1	2			3	4		5
6			7				
		8				9	
10					11		

Skribu silabon en ĉiu kvadrato. Jen estas listo de bezonataj silaboj:

AD, BA, BE, DO, ĜAN, ĜO, ĜU, KA, KO, LE, LO, LO, MAL, ME, MO, NO, NO, O, RIA, RO, RU, SA, STO, TA, TI, VI.

HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. Meti objekton al pli malalta nivelo; 3. Rilata al la maro inter la Balkania kaj la Italia duoninsuloj; 6. Kapablo ĝuste juĝi; 7. Meblo, atinganta la alton de la brusto; 8. Fiŝo, simila al ezoko; 9. Kovru per maldika tavolo de oro! 10. Tuto de la loĝantoj; 11. Al malsaĝulo ne helpas admono, nur ___ (Zamenhof).

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. Al ___ ne helpas admono, nur bastono; 2. Regulo, juro; 3. Al malsaĝulo ne helpas ___, nur bastono; 4. Ĉefurbo de Saud-Arabio; 5. Monto en Ekvatora Afriko; 7. Ruĝo aŭ nigro; 8. La litero β; 9. Malmola organo de la vertebruloj.

Fonto: Semajno de Enigmoj #7

<http://www.semajnodeenigmoj.com>

(La solvo troviĝas en paĝo 31)



*Muta naturo kun porinfanaj objektoj,
akvarelo, 36 cm x 48 cm, 1976*



estis eskapinta de la morto. Dum tagoj unuflanke tra hoso ligita al vejno mi ricevis infuzaĵon kaj „aliflanke“ mi estis ligita al klistero-aranĝo. Nur post tiu tempo mi rajtis revidi mian infanon. Dum la nutrado la bebo tiom energie suĉis, ke min doloris forte. Ŝiro en la mampinto. Bedaŭrinde venis eĉ ne guteto da lakto.

Post plua sensukcesa provo oni ablaktadis min per glacisaketoj. Pro tro longdaŭra kaj eksterordinare forta sangado mi ne rajtis hejmeniri kun mia infano. Post 14 tagoj mi havis subitan, fortan sangadon sube, la sango elvenis kvazaŭ el akvotuvbo. Mi kuŝis en mia propra varmega sango. La flegistinoj alarmis, kuracistoj hastis al mi, mi ricevis oksigenon, denove ligan al infuzitubo kaj mi estis ligita al kontrolaparato.

Kuracistino daŭre prigradis min. Sekve de plia sangado post du tagoj oni en operacio forprenis al mi la uteron. Mi ricevis tranĉon en la kubuta faldo, por ke oni povu pli facile ligu la infuzian tubon al la vejnoj. La maldekstra brako dum semajnoj estis rigida kaj doloranta. La opinio estis, ke mi estu gaja kaj feliĉa, ke mi havas infanon. Mi ja estis! En la utero troviĝis granda kiel infankapo placenta polipo, ankoraŭ benigna miomo. Estis ĝi, kiu tiom forte sangis. Komence malgranda kiel pinglokapo kaj tial nevidebla, ĝi dum la gravedeco kreskis al la menciita grandeco. Pro tio la suspekto pri ĝemeloj. Se ĝi estus restinta malkovrita, ĝi en mia maljunaĝo estus fariĝinta kancero. Post la vekiĝo post la operacio mi havis terurajn dolorojn! Mi estis firme ligita al la lito per ledaj rimenoj. Dum ĉiu tiu tempo mia patrino kune kun la tuta anaro de la libereklezia paroĥo preĝis por mia transvivo. Post 7 semajnoj en la hospitalo la kuracisto rakontis al mia patrino, ke laŭ lia opinio preskaŭ estas miraklo, ke mi transvivis. Mia patrino ĉiam preĝis por mia bono. Hodiaŭ mi preĝas por la bono de ĉiuj kaj unue dankas.

Ĉar mi, estante en la kirurgia sekcio, ne rajtis vidi mian infanon, kiu kuŝis en la skedio por novnaskitoj, mi ploris kaj ofte kaj ĝemante almozpetis tiun favoron. Kiam mi - ankoraŭ tute blanke pala kaj necerte iranta - denove povis uzi miajn gambojn, komprenema flegistino gvidis min al la stacio kaj al mia infano. Finfine mi rajtis vidi Jana - je certa distanco. Ses semajnojn aĝa, ŝi en sia vesteto aspektis ameginde kaj ŝi alradiis min. Ŝi baraktis per siaj gambetoj kaj braketoj etenditaj al mi. Dum nia adiaŭo de la malsanulejo la infanflegisto portis Jana en la kuseno tiom enamiĝinte, ke mia koro doloris. Tiom longe ili kutime ne prizorgis infanon - ho, kion kaj kiom mi maltrafis dum tiu tempo!

Daŭre mi tre bone memoras, kie kaj kiel mi infano pensis: „Kiam foje mi havos infanon, mi ne faros la samajn erarojn, kiel tiujn, kiujn faras mia patrino ĉe mi!“

Temis por mi pri miaj seniluziigoj pro facilanime eldiritaj neplenumitaj promesoj. Pro ŝia daŭra trozorgado mia patrino devigis min, ĉiam finmanĝi. Kelkfoje mi poste devis vomi. Mi ofte estis malsana.

Post 4 jaroj kiel edzino mi estis feliĉa, kiam mi 25-jara gravediĝis. Mia edzo volis unue ŝpari por mebloj, por ke nia infano ne kresku en mizeraj cirkonstancoj. Tiam fariĝis laŭdezira infano. Forte mi sentis la amoplenan koncipadon la 7-an de Oktobro 1969. La ginekologo diris: „Ĉio estas sana. Vi povos havi dekon da infanoj!“ Poste li aldonis, ke mi aspektas kvazaŭ mi ricevus ĝemelojn, tiom dika estas mia stomako, sed ke li povas aŭdi nur unu korbataĵon. Mi estus eminta havi ĝemelojn. Tiam, en 1970, ankoraŭ ne ekzistis ultrasonaj detektiloj.

Mi volis ĉion ĝuste fari. Mi aĉetis la libron „Nia Infano“.

La akuŝo finiĝis post 9 horoj da fortaj naskokonvulsioj, kiujn mi eltenis brave spirante, per tranĉo fare de la akuŝistino. Mi vidis ŝin preni tranĉilon kaj dum forta premkonvulsio helpis al la infano en la liberecon, precize je la 20.45 la 1-an de Julio 1970. Rapida glito, plorado...knabino! Al ŝi mankis nenio! 3,75 kg kaj 50 cm. Kiel ŝi nomiĝu? JANA! Post la lavado kaj vindado oni montris al mi mian infanon: grandegaj rondaj okuloj! Ŝi suĉis je sia diketa maneto kvazaŭ ŝi malsatis. Bedaŭrinde oni tuj forprenis la infanon denove. Pro la forta sangado alvenis kuracistoj. Mi ricevis narkozon. Kiam mi matene vekiĝis, oni informis min, ke 10 kuracistoj la tutan nokton baraktis por mia vivo. Oni diris, ke mi kvazaŭ

Hejme alterne la patro de Jana kaj mia patrino prizorgis ŝin, ĉar mi post la operacio ankoraŭ estis tro malforta. Pro tio mi denove ricevis malmultan kontakton kun mia infano. Moŝte la du plenkreskuloj degnis meti mian bebon en mian sinon. La sekvantan tempon kun mia infano mi vere ĝuis. Flegado kaj nutrado okazis komplete laŭ la libro, por ke ĉio estu ĝuste farita. Mia Jana estis sunbrilo! Ŝi ĉiam ridis, neniam kriis, krom unu fojon, kiam oni dum pesado estis metinta ŝian kapeton sur la malmolan metalan eĝon de la pesilo.

La escepte belan formon de ŝia kapo, preskaŭ kiel tiu de knabo, la kuracisto ofte admiris.

Kaj korpe kaj mense Jana evoluis brile. Mi ridis, kantis, laŭtlegis, gimnastikis, promenis en la naturo, pentris, slojdis, bakis, kuiris kaj ludis abunde kune kun mia infano. Mi trikis por ŝi unikaĵojn kaj akiris belajn vestaĵojn. Vintre dum la komuna luĝado ŝi portis varme subŝtofitajn botojn, la ruĝan pelteton kaj la felĉapelon kun felaj kugletoj. Tiel mi por la bildo aranĝis la aferojn kun la korbteketo, la koltuko, la pugnogantoj kaj la bonbono en sia orpapero kiel okulkaptilo. Foje mi estis leginta: „La kompono de muta naturo estu festo!“ Tiel estis. La akvarelon mi planis kiel mutan naturon kun limigita, preskaŭ unukolora varma koloreco. Tio en la jaro 1976 estis mia tasko dum mia speciala studado pri pentrado kaj grafiko por gvidantoj de la popola

artkreado. La aferojn mi estis aranĝinta post la luĝado sur la malaltan infanan tableton, kie mi ofte pentris kun Jana. Ŝi tiam havis 5 jarojn.

La bildo estis speco de hejmtasko. Amplene mi penis laŭeble reprodukti la ecojn de la diversaj materialoj: de la ledο, la felo, la korbteko, la lano, la bonbono. La bildon mi donacis en 60 cm x 80 cm granda kadro al mia filineto.

Postvorto

Jana estis la plej bona lernanto ne nur de sia klaso, sed eĉ de la tuta lernejo, ŝi ricevis nur la plej bonajn notojn.

Hodiaŭ mia filino estas edukistino en dumtaga restadejo por problemhavaj infanoj. Ŝi diras, ke ne la infanoj havas la problemojn, sed la gepatroj.

Ŝi helpas al la infanoj solvi la lerneajn hejmtaskojn, pentras, slojdas, ludas, kuiras, bakas, muzikas, kantas, luĝas, faras ĉion tion, kion ni kune spertis. Memkompreneble mi estas same zorgtimema kiel estis siatempe mia patrino, sed multe pli komprenema, fiera kaj feliĉa pri kaj pro mia filino. Kaj mi opinias, ke ankaŭ tiu ĉi unika muta naturo kun la infanobjektoj sukcesas esprimi nian rilaton kaj amon.

sendis **Helga Plötner**, portretpentristino el Germanio

Mirinda renkonto (9/10)

(naŭa parto)

Nuba decembra tago. Tero frostiĝis. Ja, estas malalta temperaturo -2 gradoj. Se oni povas kredi al veterprognostoj ĉirkaŭ meze de la tago estos pli varme. Nome, ekstera temperaturo plialtiĝos kaj aperos suno. Ja, vintras!

Subita bruo haltigis junulinan revadon. Sara saltis el la fotelo serĉante sian mobitelon.

- "Saluton" - respondis ŝi gaje al la bone konata voĉo.

- "Ĉu vi baldaŭ venos?" demandis ŝi la konatulon.

- "Ne. Mi ne venos baldaŭ... Mi tuj venas ĉe vi!

Deŝlosigu vian dompordon!"

Sara estis surprizita. "Kia bela surprizo!" ekpensis ŝi malfermante vaste la dompordon.

Du junuloj forte brakumis unu la alian..

- "Diru surprizo!" - diris Pavlo al Sara.

- "Bone, mi diras."

- "SURPRIZO" - diris Sara gaje. Tiam en la domon pave enpaŝis Petro kunportante mezgrandan skatolon samtempe oferante ĝin al Sara.

- "Kio estas intere?" scivolis Sara.

- "Malfermu la skatolon" diris Pavlo.

verkis kaj sendis Miriĉ Jadranka el Serbio

Sara senpacience atendis. En la skatolo troviĝis la alia skatolo, kaj remalfermante la duan kaj trian skatolon. Tiel okazis ĝis kiam oni ne malfernis la lastan skatoleton. En ĝi estis papero sur kiu estis skribaĵo per grandaj literoj TESTUDO kaj KIEL TRAVIVI!

- "Testudo" ekkriis Sara.

Ŝi ekkuris al brakumo de Pavlo.


- "Kiel vi sciis!" - embarase demandis ŝi la junulon.

Tiam enmiksĝis Petro klarigante al ŝi:

- "Ja, mi flustris tion al oreloj de Pavlo. Li intencis donaci iu besteton al vi, kaj mi sciis vian sekreton, kiom vi ŝatis havigi testudon!"

Sara estis feliĉa. Ŝi ne estas sola. Ŝi havas verajn geamikojn. La junuloj kaj iliaj amikoj alportis la testudon ekster la domon. Tie troviĝis bela ĝardeno kun altaj betuloj kaj unu granda kverko, kiu apenaŭ dividis proksiman arbaron de ilia domo. Tie sur la pado gaje saltetis la granda Mastro urso kun tri ursetoj kaj la Blanka leporeto Miko kaj ludanta hundeto Flavulo Zucko.

Petro estis vestita sporte sed Pavlo havis



stelbrilan kravaton sub lia varma jako. Ekrimarkante tion Sara okule kaj fingrosigne demandis ili

- "Pardonu min, ĉu la surprizo ne finiĝis? Ĉu Pavlo, ankoraŭ havas ion por diri! Mi vidis kravaton!" diris ŝi ride.

- "Ne, respondis Pavlo. Fakte mi havas proponon. Antaŭ dek tagoj la lernantoj el nia najbara lernejo petigis min, ke ni akompanu ilin ĉe la urboplaco ĉi-vespere. Do, ili preparos belan aranĝon kadre de humana aktiveco por la malriĉaj infanoj. Kaj kiel vi scias venas Nova Jaro kaj mi en mia nomo promesis helpi ilin."

- "Ĉu mi bone faris?" Pavlo finis sian klarigon.

Sur lia vizaĝmieno flugadis ombretoj. Paŭzo finis ĉar ĉiuj ekridetis kriaĉante "Jes, jes bonege!"

Posttagmeze aperis sunradioj. Ekstera temperaturo plialtiĝis je ok gradoj! Ĉi-Decembra prolongita seka senneĝa vetero taŭgas al eksteraj laborantoj, vilaĝanoj al senhejmuloj al hundoj vagantaj al malriĉuloj. Klimato tre ŝanĝiĝas. Aero en vesperaj horoj estas tre haladzita pro la fumotuboj kaj aperonta nebulo. Homoj tre malfacile spiras. Kvankam la urbo havas belegan verdan arbarparko la plimuto de arboj malsaniĝis. Feliĉe, homoj komprenis en la lasta minuto kiel estas grave savi tiun belan magian arbaron. Eĉ niaj amikoj plantis novajn arbojn kaj tiujn malsanulojn oni sanigis.

Je la oka vespere kolektiĝis niaj amikoj en la granda ĉambro por pridiskuti kion ili estis preparitaj por la ĉi vespera aranĝo. Sara vestis belan rozkoloran robon, same ŝi metis tian onamitan harofiksilon, sur la

pinto de la kapo. Ŝiaj okuloj brilis rigardante al direkto de Pavlo. Ĉiu alia estis aparte modeste vestita sed kun bona gusto. Sara diris fiere "Jen, ni ĉiuj mem preparis mane la bildkartojn kiel gratulkartoj por la Nova Jaro. Dume Petro kaj Jana estas ekkantontaj belan kanton dediĉita al Novajaro okazonta je la deka vespere kune kun la infana ĥoruso."

Ĉiuj aplaŭdis gaje. Ili preparis siajn donacetojn enpakigitajn kaj ligitajn per multkoloraj maŝoj.

Tiam eksonoris sur la domopordo. Venis taksio por la junuloj. Petro amuziĝis kun la gaja amikaro irante piede tra la urbo. Subite la grupeton haltigis du pli aĝaj homoj petante al ili, ke ili lasu tri ursetojn kun ili en la apuda domo por amuzi ilin dancante laŭmuzike, ĉar ili festas naskiĝtagon de sia filo.

Petro nevole akceptis tiun proponon sed decide li diris "Mi lasos ilin se vi promesos, ke vi ĉiuj alvenos je la deka al la urboplaco kie ni havos aranĝon."

La novuloj akceptis ĉion proponitan flanke de Petro. Dirite farite.

Tiel tri ursetoj: la Grandokulo, la Bluaĉapulo "Klaŭno" kaj la Sportemulo kiel mezalta urseto, forlasis sian gajan grupeton.

Kio okazis je la deka vespere ni vidos. Ĉu oni devas kredi je novulroj?

Atendu pacience ĝis la nova rakonto!

(fino de la naŭa parto)

verkis kaj sendis **Miriĉ Jadranka** el Serbio

Funeralo

tradukis kaj sendis Carmel Mallia el Malto

La funeralisto belvestita
tiris la ĉerkon,
la piedojn antaŭen.

La akvo-ŝprucisto preĝis
kaj postmarŝis.

Ambaŭ renkontiĝis ĉe l'kafejo
mendis kukojn kaj teon kaj foriris.

La ĝemantoj
estis rekompencitaj, poste
ili partoprenis tombolon.

Kaj

La enterigisto kiel kutime
forludis sian labor-pagon ĉe la
klubo.

Post la funeralo
liaj amikoj kaj aliaj
renkontiĝis ĉe la bufedo
kaj drinkis bieron, teon kaj
limonadon.
Ili manĝis kukojn, pasticojn
kaj poste foriris.

Nu la familianoj... haste ekiris
ĉe l'notarion.

poemo de **Fredu Cachia** *

* (**Fredu Cachia** – pr: kakia- 1937-): Malta
elmigrinto al Aŭstralio; socia kantanto, gitarludanto,
membro de la Literatura Malta Grupo en Victoria,
Aŭstralio.



tradukis kaj sendis
Carmel Mallia el Malto



3. La ruĝkura birdo.

Post la ekzameno komencis senfinaj ferioj de Glano kaj senfinaj malfeliĉoj de la loĝantoj de Kverko. Apenaŭ eliĝinta el sia dormejo, Glano senprokraste ekmontradis sian veran valoron.

Dankante la Hirundon pro la lecionoj, li modlis per argilo la pordon de lia dometo. Hejmfluginta Hirundo frapis la pordon el ekstero kaj hirundidoj el intero, sed nenio efikis: Suno tiel sekigis ĝin, ke la ĉarpentisto Pego devis esti invitita por helpi. Li trabekis novan aperturon kaj tra ĝi eltiris malsatajn kaj apenaŭ spiretantajn hirundidojn.

Eĉ Glano mem ektimis la postsekvojn de sia spritaĵo kaj li ĵuris al siaj najbaroj ne plu tiel kondukti. Tamen apenaŭ post kelkaj tagoj, kiam la arboĵantoj finis pridiskuti lian aĉan koduton, Glano prenis la tabulon kun la surskribo "Sturno" kaj pendigis ĝin ĉe la pasera loĝejo kaj la tabulon kun la surskribo "Pasero" alnajligis al la truo de Sturno. Li mem kaŝis sin malantaŭ branĉo kaj atendis por la venontaj eventoj.

Hejmflugis Sturno, flugadas ronde kaj miras:

- Se mi ne kapablus legi, mi pensus, ke mi ekdeziris gasti ĉe Pasero.

Hejmflugis Pasero kaj nenion komprenas:

- Verŝajne mia edzino interŝanĝis loĝejojn kun Sturno.

Pasero enigis sian kapon en la truon, sed Sturnino ekfrapegis lian frunton per beko kaj pelis lin for. Pasereto eksidis, ekskuiĝis kaj post kiam plu ne flugis steloj el liaj okuloj, li ekvidis, ke en la mallarĝa enirejo de lia dometo sidaĉas enŝtopiĝinta Sturno.

Nur nune la najbaroj ekkomprenis la friponaĵon kaj subite ekplendis al Kverko. La konversacio ankoraŭ ne estis finita, kiam en la lageto aŭdiĝis terura bruego. Glano naĝis surdorsiĝinte Raninon Kuotren kaj svingis per bastono. La najbaroj kuregis por savi la mizerulinon Kuotren. Glano pumfalis en la akvon kaj malaperis. Nur antaŭvespere li hejmvonis, alkoĉiĝinte al la paserida vosto, silenta, kun skrapita nazo.

Dum la vundo saniĝis, Glano estis nenie videbla. Tamen post ia tempo li ree ekpetolis: li grimpis en la neston de Korako kaj pinglis ĝin per eglanteriaj dornoj.

Dum sunsubiro Korako revenis el la promeno kun siaj korakidoj kaj sidis por ripozi. Tuj li eksentis piketon en sian kropon. "Eble mi glutis najlon" – pensis Korako. Tamen lia ventro ankaŭ ekdoloris. La maljunulo ne sukcesinte plu teni, plendis al sia edzino:

- Grak, grac, mi sentas la doloron en stomak'.

Li provis renversiĝi surflanke, tamen subite

ekdoloris lia flugilo. Poste ekdoloris la gambo kaj ree la kropo. Korako ekgrakis tiel laŭte, ke kuniris ĉiuj najbaroj. Inspektinte la nigrulon, ĉiuj ekveis pro miro: ĉiuj plumoj de Korako estis plenplene pinglitaj per eglanteriaj dornoj. Ĝismatene la kaŭriĝintaj korakidoj tiradis ilin el la maljuna, malmola haŭto de sia patro. Ĉi tiu okazintaĵo malpacienigis la najbarojn. Ian festvesperon ili organizis interhelpon, modlis malgrandan loĝejon, kradigis la fenestrojn kaj decidis pro ĉiu krimo teni Glanon en malliberejo.

Pro tio la petolanto tute ne malgajiĝis. Al li eĉ plaĉis ĉi ludo. Li tute ne kontraŭis kaj memvole enprizoniĝis. La najbaroj ne povis kredi je tia feliĉo kaj puŝis sin ĉe la fenestro por ekvidi, ĉu vere la petolulo ĉi foje pacienciĝis. Kaj Glano dormis fleksiĝinte kaj per unu okuleto spektis, kio estas okazonta.

La unua, observinta la trompon, estis kolombido. Surpriziĝinta li ekkriis:

- Estis mi blanka, kaj nun mi estas nigra!

Ĉiu, kiu tuŝis la kradon por pli bona observado, makuliĝis aŭ sian kropon, aŭ kapon, aŭ bekon, ĉar Glano estis anticipe ŝmirinta la kradon per fulgo. Ĉiuj loĝantoj de Kverko estis entute malgajiĝintaj kaj senespere mallevigis siajn manojn. Nur la maljuna Korako, interkonsilinte kun Kverko, flugis al sia malnova amiko Gufo, por demandi, kio estas farenda, se la petolulon neplibonigas eĉ malliberejo.

Sekvontmatene, preter la ĉearbaro veturis korespondantoj kaj haltis por ripozi en la kverka ombro. Glano ĵetis rigardeton al ili, ĉirkaŭrigardis sin kaj pozis fanfarone:

- Kaj ĉu mi estas pli malbona ol ili? Mi ankaŭ posedas klarecon, mi havas bireton kaj ĝi estas kun franĝeto, mi ankaŭ veturados priskribante ĉion.

- Sed sub via ĉapo vi ankoraŭ nenion havas, - bonvoleme insultis lin Kverko.

Glano ege ofendiĝis. Li montris sian langon al la patro kaj ekkriegis:

- Vi mem estas maljuna putraĵulo, vi mem nenion komprenas!

Kiel Glano pripensis, tiel li faris: li rulumis la korakan kajeron, suborligis la paseran plumon, pendigis subkole la helikan inkujon kun la viburna inko kaj forveturis. Li foriris saltetante kaj kantante lian favoran kanton:

*Mi ne kreis grandajn verkojn,
Estas mi ja eta Glano.*



*Morgaŭ estos mi jam Kverko,
Plej potenca Arbarano.*

Kverko svingis al sia filo per branĉoj, akompanis lin per zorgema patra rigardo kaj peze ĝemis:

- Mian koron vi frakasos, se la hejmon nun forlasos.

Kaj Glano saltetis, saltadis, timigis la ĉevojajn lokustojn, terurigis skarabojn, pli kaj pli malproksimante de sia hejmo. Kiom da tempo li tiel iris, estas malfacile direbla. Komence li kalkuladis la ĉevojajn arbojn, sed baldaŭ li ekmankis la manajn kaj piedajn fingrojn por kalkulado, do li entute ĉion miksis. Tiam li surgrimpis la plej altan agrostidon por ĉirkaŭrigardi. Ĉirkaŭe nenio viva videblis, nur ie en malproksima herbejo longpaŝe iradis ia stranga ruĝkrura nigrovosta birdo.

- Saluton, Viransero! – ekkriis alkurinta petolulo. – Ni interkonatiĝu: mi estas la korespondanto de la plej dika revuo en la mondo.

La birdo rigardis al li, balancis sian kapon kaj klakis per sia beko:

- Ki, ki, kiu estas vi?

- Ko, ko, korespondanto, - ekimitis lin Glano.

- Kaj ki, ki, kiu estas mi?

- Viransero.

- Ti, ti, tiam saluton, Terbuleto.

- Vi estas ne nur surda, sed ankaŭ blinda, - mallaŭdis la birdon Glano.

- Se mi povas esti Viransero, kial vi ne povas esti Terbuleto aŭ Lumbriko? pacience respondis la birdo.

- Ne ofendu min, mi estas filo de Kverko!

- Mi konas tion! Sed samtempe vi estas la plej granda malklerulo, se vi ne distingas Cikonion de Viransero. Ne fanfaronu, mi vin eĉ sen la ŝelo rekonas. Pri via senmoraleco jam ĉiuj ranoj kvakas.

- En nia arbo ne nur birdoj sed ankaŭ Heliko versadas, kaj vi ne scipovas.

- Nenia problemo versadi, - respondis Cikonio. lomete pripensinte, li daŭrigis:

Ka, ka, ka kaj klak, klak, klak

La mensog' – ja honta fak'

Kial, Glan', mensogas vi?

Klak, klak, klak kaj ki, ki, ki.

Ekvidinte, ke mensogo ne estos taŭga kunvojaĝanto, Glano jam provis fuĝi, tamen Cikonio kaptis lin ĉekole kaj diris:

- Se vi estas tiel granda versoŝatanto, aŭdu, kion pri vi marĉaj najtingaloj pepadas.

Glano provis piedbatadi, ribelegi, pugnobati, tamen nenio efikis. Cikonio portis la petolulon al la plej

proksima lageto kaj tenante lin en sia beko igis lin aŭdi. Post mallonga tempo la ĥoro de la kuzinoj de Kuotre, omaĝe al li ekkupletis jene:

Glano – petolulo,

Glano fanfaronas,

Kverko – patro nobla,

Nur la fil' malbonas.

Li nenion scias,

Li nenion konas.

Grandan malfeliĉon

Al la Kverk' sort' donas.

Tamen eĉ tiuj-ĉi vortoj Glanon ne boninfluis. Li kaptis ŝtonon kaj ĵetegis ĝin en la lageton.

- Silentiĝu, vi dikventrulinoj! – li kriis. – Mi plendos al mia patro, tiam vi ekvidos, kio al vi okazos.

Sed la ranoj ne kapitulaciis. Ili, verŝajne, aŭdacis prikanti ĉiujn entreprenojn de la petolulo, kiel li interbatiĝis, molestis pli malpotenculojn, ne obeis la plenaĝulojn kaj ĉiam tenis sian nazon supren. Tamen Glano ankaŭ ne kapitulaciis: apenaŭ aŭdiĝis ie ranaj voĉoj, li senprokraste ĵetegis en tiun lokon po kelkajn ŝtonojn. Tia batalo daŭris preskaŭ tutan duonhoron, sed ranoj estis pli multaj: la ŝtono ankoraŭ ne estis atinginta unu flankon de la lageto, kiam aliloke jam kriegis kelkaj:

- Kvak, kvak, kva... la mano kurba!

Glanaj ŝtonoj celflugis ankaŭ al ili. Jen aliaflanke aŭdiĝas kortrema krio:

- Ĵetegu, ĵetegu, vi malplenkapulo, kurbmanulo!

Ŝtonoj flugas ankaŭ al ili! Sed sur la tria flanko aŭdiĝas eĉ pli forta krio:

- Kva, kvak, kva, lia kapo ligna!

Glano ekmankis forton kaj paciencon kaj la ranoj en ĉiuj anguloj de la lageto tiel kriegis, ke la tuta ĉirkaŭaĵo je multaj mejloj reeĥadis. Al ili respondadis ankaŭ la najtingaloj de aliaj marĉoj kaj flakoj. Tian unuecon la petolulo neniam estis spertinta. Pro kolero li ŝtopis siajn orelojn per poleksoj kaj fermis la okulojn.

- Nu, ĉu plaĉas al vi? - demandis lin la ruĝkrululo.

- Plaĉas! – respondis la impertinantulo. – Lasu min for!

- Se vi eĉ nun ne pliboniĝas, ni ion alian pripensos, - balancadis la kapon la malrapida Cikonio.

- Ne via afero, - refutis al li Glano. – Lasu min for!

Levis Cikonio Glanon de la tero, svingis per siaj fortaj flugiloj kaj suprenflugis malantaŭ la nuboj. Tuj la kapo de la malgranda petolulo turniĝis kaj la okuloj mallumiĝis. Li nenion plu sentis. Kaj la birdo portis lin pli foren tra arbaroj kaj montoj, tra riveroj kaj lagoj al la nenies vidita, de neniu vizitita Lando de Malvirtoj.

Do, Korako ne sukcesis ĝustatempe transdoni al li la prudentajn vortojn de sia amiko Gufo.

(daŭrigota)

"La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj" estas libro de litova verkisto Vytautas Petkevičius (1930 – 2008). Li estas sufiĉe konata kaj precipe fama pro siaj porinfanaj kreaĵoj.

La blanka fadeno

Mi parkis mian aŭton antaŭ banko kaj oscedante legis libon "Serĉu mian sonĝon" de Istvan Nemere. Mi oscedis ne pro tio, ke ĝi estis ne interesa. La libro estis perfekta! Mi oscedis pro tio, ke nokte longe mi interretis kun miaj geamikoj. En la bankon kaj al apude situanta monkontanta aparato venadis nur maljunuloj, pardonu min, sinjorinoj, pro tio mi komencis dormeti...

Tamen subite apude haltis blanka "Audi" kaj saltis el ĝi nigre vestita ĉarmulino! De supre, ekde ŝultroj ŝi estis streta, malsupren ampleksiĝis! Ĉarmulino ekstaris ĉe monkontanta aparato, enigis bankokarton kaj atendante ŝi malpacience skuis maturiĝintajn femurojn, kaj tiuj skuis dibelegajn kruojn... Ŝia nigra palteto laŭlonge egaligis jupeton... Kaj sur tiu palteto, kiel vertikala montrilo, pendis la dika blanka fadeno... Al sinjorino tiu fadeno eble taŭgus kiel detalo de vestaro, memoriganta la homan neglektocon. Sed al tia gracia belulino!? Ege konsternita mi impulse saltis el mia aŭto kaj faris kelkajn klaftajn paŝojn kun etendita mano! Ĉarmulino sin returnis kun la mono enmane. La okuloj ŝiaj frenezigiĝis. Ŝi akre kriis:

– "Oni prirabas! Helpu min!"

El blanka "Audi" elsaltis, kiel fulmoj, du viroj, kaptis kaj ĵetis min kune kun libro en la finon de aŭto kaj forveturis.

– Viroj, tiu blan-ka fa-de-no... – balbutis mi.

– Vi ne havas hejme blankajn fadenojn? – esplordemandis tiu, kiu stiris la aŭton.

– Mi ha-vas... – respondis mi.

– Do eble vi ne havas prudenton? Certe, vi ne havas ĝin! – daŭrigis la stiristo.

– Ĉu videblas? – demandis mi. – Mi konfuziĝis.

– Ĉu verkisto vi estas, ke tiel ironie parolas? – demandis tiu apude sidanta.

– Nu, humoristo... – konfesis mi.

– Kaj kion vi verkis? – scivolis la stiristo.

– "Krestomation de diboĉulo". Bonega libro! Ĉu vi volas aŭtografon? – mildigis la situacion mi.

– Skribu... Blanka fadeno... Estetikulo! Kaj kion vi farus, se estus la nigra fadeno? – daŭris la stiristo.

– Ĉu tio ĉi estas testo por diagnozi cerbajn tavolojn? – kuraĝis mi.

– Ne, tio ĉi estas demando por la unuaklasano, – parolis la apude sidanto.

– Kaj mi havas demandon al la unuaklasano: en kio diferencas la blanka fadeno dis de nigra fadeno, ĉu

humuraĵo de Laimundas Abromas el Litovio

nur je koloro?... Atendu, viroj, tamen vi estas sen uniformoj! – daŭrigis la atakon mi.

– Sed ni ne estas policistoj..., – konfesis la apude sidanta.

– Kaj mi ne estas verkisto... Tamen mi nenion komprenas kaj ne perceptas incidenton, – daŭre atakis mi.

– Neniu perceptas! – respondis la stiristo, kiel mi komprenis, la estro.

– Ĉu vi estas el privata gardoservo? – scivolis mi.

– Mmmmm... jes, – konfesis la estro.

– Vi estas profesiuloj kaj havas aŭton, tamen laboras kiel malsaĝuloj!

Ĉiuj interrigardis unu la alian.

– Pli klare, mi petas! – komencis nervoziĝi la estro.

– Pli kurte! Esenco de la afero estas tie, ke vi restigis fraŭlinon kun mono sengardan. Eble mi estas nur logaĵo por vi, intertempe la vera rabisto..

La estro reagis tuje kaj la blanka "Audi" saltis desurloke! Je cent metrojn de banko – stop!

– Jen..., ŝi staras ne tuŝita! – ekspiris la estro. – Elaŭtiĝu vi..., – ordonis la estro.

– Alveturu la bankon. De kie vi prenis min, tien metu! – ne cedis mi.

– Ŝi denove krios! – parolis la estro.

– Ŝi ne plu krios. Timiĝinta ŝi ne enmemorigis rabiston. Veturu ĝis la banko, – la situacion jam regis mi.

Mi elaŭtiĝis, kaj fraŭlino tuj alkuris min

– Ĉu vi estas komisaro? – demandis ŝi. La fantastan ideon ŝi subŝovis al mi.

– Jes. Nomu min Kontrimas..., – mi tuj utiligis la momenton.

– Kaj kie estas tiu rabisto? – interesiĝis ŝi. – Pardonu min, mia nomo – Oksana...

– Arestita li... Eble sukcesos al vi ambaŭ interpacigi... Ĉar li nenion malbonan faris al vi!, – mi parolis plu.

– Vere... Mi tre forte timigis lin!, – cedis ŝi. – Dum pandemio polico havas tre multe da laboro, kaj tiu homo tute ne kulpas, al mi tion diras la koro... Interese, kiel li sin pravigis?

– Li diris, ke volis li de sur via palteto forpreni blankan fadenon... Vidu, tiu homo estas granda



estetikulo...

Ŝi tuj demetis de si la palteton. En novembro ekfloris por mi la siringo.

– La blanka fadeno ! – ekkriis ŝi ruĝiĝinta. – Koŝmaro!... Estu afabla, forprenu tiun askaridon kaj ĵetu en rubujon...

Oksana observis min per klara rigardo de la piedoj ĝis kapo.

– Via vizaĝo tiom grandanimas ! – ekflatis Oksana.

– Ĝi estas tia ekde mia naskiĝo..., telefonu al mi laŭ tiu ĉi numero... Sed pli bone venu... persone tiuĉiadrese, –

Oksana kisis min je lipoj.

– Liberigu tiun homon, – ŝi petis afable.

– Li jam estas libera... Oksana, vi ĉarmas korpe kaj anime..., – ne ĉesis mi.

– Vi estas poeto! – ekridetis kaj okulsignis ŝi.

Ŝi faris kelkajn paŝojn direkten al aŭto kaj sidiĝis en la blankan “Audi”.

– Saluton, fraĉjoj! Kaj jen – mi, – ĝojkriis ŝi.

Mi rericervis mian libron kaj adiaŭis...

Ĉi-nokte mi sonĝis Oksana-n... Vere, en sonĝo ŝi estis tute sen nigraj vestoj, tial aspektis blanka, kiel ŝveliĝinta pasto... Tamen –en kio diferencas la blanka fadeno dis de nigra fadeno ? Ĉu nur je koloro? Dubinde...dubinde... Tio ĉi estas fatalo !

Ho, iu telefonas ! Oksana... Hieraŭ ŝi telefonvokis dekfoje! Vi dezirus ekaŭdi niajn interparolojn ...? Karamba ! Ja, ĉifoje sonas ĉeporda sonorilo. Surkorte haltas blanka “Audi” de Oksana.

Vi dezirus ekvidi nian unuan rendevuon ! Ne estu vi, nur ne estu vi sciavidaj!

verkis kaj sendis **Laimundas Abromas** el Litovio

Se estus mi anstataŭ tiu

Estis malvarmega ventega vintro en Bukaresto en 1954, kiam mi vizitadis la unuan klason de bazlernejo. Komence de tiu vintro, ni ekkhavis novan koleginon, kiu ĵus transloĝiĝis en nian kvartalon. Kelkajn tagojn post sia alveno, tiu knabino ŝtelis la lanan ĉapon de alia knabino. Ŝi mallerte kaŝis ĝin, tiel ke oni tuj malkovris la ŝtelon kaj ŝi estis devigata redoni la ĉapon plorante. Sed neniu el ni plu volis proksimiĝi al la eta ŝtelistino. Subite ni ne plu parolis kun ŝi, ne plu ludis kun ŝi kaj ne plu sidiĝis apud ŝi. Ĉio ĉi okazis dum la lasta paŭzo de tiu tago. Kelkaj knabinoj kriis aĉajn insultojn al la ŝtelistino kaj minacis bati ŝin, sed ili ne havis tempon plenumi sian intencon, ĉar la paŭzo finiĝis. Ili furioze kaj brue anoncis nian instruistino pri la okazaĵo.

Tiu ĉi unue silentigis ĉiujn. Ŝi rigardis per kortuŝita mieno la etan ŝtelistinon, kvazaŭ ŝi estus rigardanta tremantan timigitan leporidon. Nur tiam mi rimarkis, ke tiu knabino estis pli malalta kaj maldika ol aliaj infanoj siaaĝaj. Ŝia uniforma robo estis tro longa kaj rompita ĉe la manikoj. Ŝiaj malsekaj ŝuoj estis truitaj, kaj ŝi ne havis ŝtrumpojn.

La instruistino diris per milda voĉo:

- Karulino mia... Kial vi ne diris al mi, ke vi bezonas ĉapon? Se mi sciintus, mi pensus pri iu rimedo... Ankaŭ viaj koleginoj povintus pensi pri iu maniero helpi vin, ĉu ne? Certe iu knabino, kiu havas palton kun kapuĉo, povintus pruntedoni al vi sian ĉapon, sen tro suferi mem pri malvarmo... Bonvolu promesi solene, ke vi neniam, neniam faros tion denove! NENIAM...

La knabineto faris promeson ploregante en la brakoj de la instruistino, kiu montris al ŝi sian lanan

verkis kaj sendis Luiza Carol el Izraelo

koltukon, sufiĉe larĝa por bone kovri la kapon kaj la kolon de la infano. Ŝi diris:

- Mi ne nepre bezonas mian koltukon, ĉar mia palto havas altan kolumon kovrantan mian kolon. Ĉu vi volas ricevi mian koltukon? Se jes, mi postulas ke vi faru iun laboron, por meriti ĝin.

Kaj jen tio kion ŝi postulis. Ŝi donis al la infano tabelon kun ĉiuj literoj de la rumana alfabeto ordigitaj laŭvice, kaj iris kun ŝi apude, al la lerneja biblioteko. Tie ŝi petis la afablan bibliotekiston akcepti la helpon de la knabino por ordigi la librojn laŭalfabete. Tiu ĉi ekzercio helpis la etan lernantinon memori la vicon de la literoj kaj samtempe donis al ŝi la senton ke ŝi ne almozas, sed gajnas la koltukon, ĉar ŝi faras gravan laboron por la biblioteko. La instruistino revenis tuj en la klason kaj parolis kun ni sen la ĉeesto de nia nova koleginino.

Tiam, per simplaj vortoj, ŝi instruis nin la ludon “SE ESTUS MI ANSTATAŬ TIU”. Ŝi diris, ke kvankam neniu povas sperti la vivon de aliulo, tamen oni ja povas imagi dum kelkdeko da minutoj, ke ni anstataŭigas nian vivon per tiu de aliulo. Ĝuste tio konsistigas la ludon “SE ESTUS MI ANSTATAŬ TIU”. Kaj ĉu ne estas tiu ludo tio, kion ĉiuj filmoj kaj ĉiuj beletraĵoj proponas al ni? Kaj ĉu ne estas tia sperto fascina ĝuste pro tio, ke ĝi ebligas nin pli-malpli kompreni la vidpunkton de alia persono? Kiel eblus estigi rilatojn de amikeco. sen provi tutkore kaj sincere kompreni la vidpunktojn de aliuloj? Kompreneble, oni neniam sukcesas ĝisfunde en tia ludo, sed tre indas almenaŭ strebi...

Por la komenco, la instruistino proponis al ni imagi ke ni havus la sorton de la eta knabino, kiu intertempe



estis ordiganta librojn en la biblioteko.

Mi rememoras, ke mi aŭskultis la instruistino senspire... Dum ŝi parolis, mi sentis min kvazaŭ mi travivus paralelan vivon...

...En tiu vivo, mi neniam vidis mian patron, kaj mia patrino estis en alia urbo. Mi loĝis portempe ĉe mia onklino, en ŝia tre malnova dometo, kien ŝi kaj mi devis alporti malvarman akvon per siteloj el komuna krano. La onklino ne havis edzon. Ŝi perlaboris sian vivon ludante akordionon en iu drinkejo. Ŝi havis ankaŭ siajn proprajn infanojn, kaj ŝi apenaŭ kapablis nutri kaj ilin kaj min...

Nia instruistino havis belegan talenton de rakontisto. Ni eksciis, ke nia eta koleginino scipovis helpi pri la zorgado de siaj bebaj gekuzoj, lavi vestojn kaj purigi la dometon de sia onklino. Je tiu aĝo, estis preskaŭ neeble al mi imagi, ke mi kapablus iam ajn plenumi tiom da malfacilaj taskoj...

La instruistino igis nin imagi, ke ni devintus alveni al la lernejo tiumatene sen ĉapo kaj sen koltuko, kun nudaj piedoj en truitaj ŝuoj... Mi honte pensis, ke mi eble rezignus pri la lernejo dum la tuta vintro, se mankus al mi taŭgaj vestoj...

Ni krome eksciis, ke la knabino scipovis ludi akordionon. Ni decidis proponi al ŝi kontribui per muziko al nia baldaŭa Novjara festo.

Mi ne rememoras ĉiujn detalojn pri tiu paralela vivo, kiun mi travivis dum ĉirkaŭ kvarona horo. Kiam mi revenis al mi mem, mi havis miksitajn reagojn, pri kiuj mi ne povis klare konscii je tiu aĝo. Unuflanke mi abomenis ŝteladon, ĉar oni edukis min tiel en la familio. Aliflanke mi sentis ke, se mi estus en ŝia situacio... min ege embarasus peti helpon de tute novaj kolegininoj... Des malpli mi aŭdacus paroli pri tio kun apenaŭ konata nova instruistino... La knabino al kiu apartenis tiu ĉapo ne havis palton kun kapuĉo, sed ja havis larĝan koltukon, kiu povintus anstataŭi la ĉapon. Do ŝi ne tro suferintus pro la manko de la ĉapo... Eble

la nova koleginino eĉ ne aŭdis en sia familio, ke ŝtelado estas terure hontinda agado... Mi ja havis familion kiu bone okupiĝis pri mi. Mi havis vestojn sen klopodi meriti ilin, kaj eĉ ne estis sufiĉe danko pro tio. Se estintus mi anstataŭ tiu knabino, ĉu mi povintus esti sufiĉe saĝa, por decidi ĝuste kiel mi devas konduki?... Ĉu?... Ĉu?...

Verŝajne miaj kolegininoj sentis similan konfuzon en siaj koroj, sed ni silentis, ĉar ne kapablis esprimi niajn sentojn...

Dum la sekvaj tagoj, nia instruistino rakontis al ni fabelojn pri amikeco kaj helpemo, sed ankaŭ pri la sociaj malbonaĵoj kiujn ŝtelemo alportas. Ni ludis la ludon "SE ESTUS MI ANSTATAŬ TIU" pri la protagonistoj de tiuj fabeloj. Dum la vintraj ferioj, la nova knabino vizitis kelkajn el ni. Ŝi alportis la akordionon kaj regalis niajn familiojn per bela muziko. Niaj patrinoj rekompensis ŝin per dolĉaĵoj kaj pakajoj kun vintraj vestoj ne tute novaj, sed puraj kaj nerompitaj. Post la ferioj, nia instruistino igis nin ludi la novan ludon pri diversaj fabeloj kaj eĉ elpensi niajn proprajn fabelojn. Ŝi ankaŭ komencis instrui al ni trikadon, por ke ni ekkapablu triki koltukojn. Per la helpo de la instruistino, la nova knabino eĉ sukcesis fari kapuĉon el faldita koltuko. En la printempo, ŝi foriris el nia kvartalo kaj ĉesis viziti nian lernejon. Ĉu ŝia patrino prenis ŝin en alian urbon?


Mi ne plu rememoras ŝian nomon. Eĉ ŝian vizaĝon mi ne plu rememoras. Ŝi ne aperas sur la nigre-blanka foto pri la lasta tago de tiu lernoĵaro, la sola foto kiun mi konservis pri tiu periodo. Kie ŝi vivas nun? Kiel ŝi vivas? Ĉu ŝi rememoras la tiaman solenan promeson? Ĉu ŝi rememoras la ludon? Ĉu ŝi spertiĝis pri trikado? Mi neniam plu tuŝis trikilojn. Sed la ludo "SE ESTUS MI ANSTATAŬ TIU" fariĝis grava parto de mia pensmaniero dum la resto de mia vivo.

verkis kaj sendis **Luiza Carol** el Izraelo

La Unua Libro

-- el la Balta Ondo retejo

La 14an de julio 1887 (la 26an de julio, laŭ la Gregoria kalendaro) en la presejo de Ĥaim Kelter (Varsovio) aperis la 42-paĝa broŝuro *Internacia lingvo. Antaŭparolo kaj plena lernolibro (por Rusoj)*. Ĝia aŭtoro, la 27-jara Ruslanda judo Lazarj Markoviĉ Zamenhof (Лазарь Маркович Заменгоф), kaŝis sin sub la pseŭdonimo "D-ro Esperanto". Ĝis la jarfino



aperis pola, franca kaj germana eldonoj de la verketo, kiu poste ricevis la "popolan" titolon: la *Unua Libro*. Sekvis eldonoj en pluraj aliaj lingvoj.

La titolpaĝo de la *Unua Libro* estis surprize simila al tiu de Volapük: *Die Weltsprache* de Johann Martin Schleyer. Reinhard Haupenthal notis, ke "la granda simileco prave supozigas, ke Zamenhof intence imitis la pli fruan verkon de Schleyer" kaj listigis similaĵojn en la du germanaj eldonoj [*Haupenthal R. La Unuaj Libroj de Schleyer (1880) kaj de Zamenhof (1887): Pri la lanĉo de du plan-lingvoj. Schliengen: Edition Ittis, 2000*]. Sed la libroj mem estis malsamaj. La 150-paĝa Volapüka estis preskaŭ kvaroble pli ampleksa, ĉefe,

pro la pli ol 80-paĝa vortaro. Schleyer alparolis la mondon propranome, sed Zamenhof uzis pseŭdonimon, ĉu por eviti misfamigon inter la klientoj, ĉu por ke la disvastigon de la libro kaj de la lingvo ne ĝenu la judeco de la aŭtoro, ĉu pro natura modesteco.

La *Unua Libro* konsistas el kvar partoj, inter kiuj la plej ampleksa estas ne la *Plena lernolibro*, sed la *Antaŭparolo* (p. 3–30).

Unue, Zamenhof mencias la problemojn kiujn la diverslingveco kaŭzas en ĉiuj sferoj de la vivo, kaj atentigas, ke ĝi kaŭzas ankaŭ malamikecon inter la popoloj. Same kiel multaj lingvoprojektantoj, li kredis ke lingvo internacia havus grandan praktikan signifon por scienco kaj komerco, sed li emfazis, ke

grandegan utilon alportus al la homaro lingvo internacia, kiu, ne entrudiĝante en la doman vivon de la popoloj, povus, almenaŭ en landoj kun diverslingva loĝantaro, esti lingvo regna kaj societa.

Efektive, Zamenhof volis solvi ne nur la lingvan problemon, kaj post pluraj jaroj li konfesis:

"mi de la plej frua infaneco fordonis min tutan al unu ĉefa ideo kaj revo — al la revo pri la unuiĝo de la homaro. Tiu ĉi ideo estas la esenco kaj celo de mia tuta vivo, la afero Esperanta estas nur parto de tiu ĉi ideo. (MEH, p. 100)"

Sed en la *Unua Libro* Zamenhof ne longe haltis ĉe tiu ideo kaj traktis, ĉefe, lingvajn aferojn. Prezente la historion de la lingvoprojektado, li konstatis, ke por lingvigi projekton oni devas solvi tri taskojn, kaj ke en neniu antaŭa projekto estis solvita pli ol unu tasko, sed li sukcesis solvi ĉiujn tri.

1) La lingvo estu eksterordinare facila, tiel ke oni povu ellerni ĝin ludante. — Tion li solvis per simpligo de la gramatiko, kiun "oni povas bonege ellerni en la daŭro de unu horo", kaj per regula vortfarado helpe de prefiksoj kaj sufiksoj.

2) La lingvo jam de la komenco mem kaj dank' al sia propra konstruo povu servi kiel efektiva rimedo por internaciaj komunikadoj. — Por tio li "aranĝis plenan dismembrigon de la ideoj en memstarajn vortojn, tiel ke la tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas sole nur el senŝanĝaj vortoj". Li donis ekzemplon de tio, ke alilandano ne konanta la rusan lingvon kaj ruslandano ne konanta la lingvon de la alilandano, povas interkompreniĝi, eĉ ne konante la lingvon internacian, nur helpe de vortaroj.

Doninte ses tekstojn en sia lingvo — Patro nia; El la Biblio; Letero; Mia penso kaj Ho, mia kor' (du poemoj de Zamenhof); En sonĝo principon mi vidis... (poemo de H. Heine tradukita de Zamenhof) — li klarigis la trian taskon:

Venki la indiferentecon de la mondo kaj igi ĝin kiel eble plej baldaŭ kaj amase komenci uzadi la proponatan lingvon kiel lingvon vivan, ne en okazoj de ekstrema bezono. — Koscianta, ke oni ne lernas lingvon, kiun neniu uzas, li proponis tutmondan kampanjon, por ke oni promesu ellerni la internacian lingvon, "se estos montrita, ke dek milionoj personoj donis publike tiun saman promeson".

Promes.o.

Mi, subskribita, promesas ellerni la proponitan de d-ro Esperanto lingvon internacian, se estos montrita, ke dek milionoj personoj donis publike tian saman promeson.

Subskrib.o:


Zamenhof anoncis, ke la adresaro de la dek milionoj da promesintoj (voĉdonintoj) aperos en aparta libro (cent milpaĝaj adresaregoj kun cent adresoj ĉiupaĝe), kaj avertis:

Poste ne estos pravigitaj antaŭ la socio la personoj, kies nomoj ne estos en la voĉdon-libro, nek en la fako de la promesintoj, nek en la fako de la kontraŭintoj. Neniu esperu pravigi sin per tio, ke li "ne aŭdis" pri la proponita voĉdonado, ĉar estos uzitaj ĉiuj rimedoj por ke ĉiu sciu pri la voĉdonado.

Krom la antaŭparolo en la libro estas:

- ok eltranĉendaj slipoj (du folioj) kun promesdeklaro (p. 31–34);
- plena lernolibro de lingvo internacia sur ses paĝoj: alfabeto, partoj de parolo (ok reguloj), ĝeneralaj reguloj (ok reguloj) — entute 16 reguloj (p. 35–40);
- permeso traduki la broŝuron al ĉiuj ceteraj lingvoj (p. 41) kaj la adresoj de la aŭtoro (p. 42);
- vortaro internacia-nacia (en la rusa 917 vortoj en 894 "artikoloj") sur du flankoj de granda folio.

Sur la dua paĝo estas jena ruslingva deklaro:

 **Интернациональный язык, подобно всякому национальному, составляет достояние общественное, и отъ всякихъ личныхъ правъ на него авторъ на всегда отказывается.**

(Lingvo internacia, simile al ĉiu nacia, estas socia propraĵo, kaj la aŭtoro por ĉiam forlasas ĉiujn personajn rajtojn al ĝi.)

Zamenhof petis sendi kritikon pri la projekto kaj

promesis utiligi la plej bonajn proponojn en speciala broŝuro, kiu fiksos la definitivan lingvoformon. Post eldono de la broŝuro la novan lingvon rajtos ŝanĝi ne li, sed nur kompetenta akademio, kiu “povos laŭgrade kaj nerimarkate fari ĉiajn necesajn plibonigojn, eĉ se ĝi estos devigita poste ŝanĝi la lingvon ĝis nerekonleco”.



Zamenhof dissendis la *Unuan Libron* al diverslandaj redakcioj, societoj, kleruloj. Kvankam li aperigis en gazetaro (precipe en Ruslando) plurajn anoncojn, li ne ricevis dek milionojn da promesoj. Tamen al li venis centoj da leteroj (pozitivaj, negativaj kaj ŝercaj), kaj eltranĉitaj slipoj kun deziresprimo lerni

la novan lingvon sendepende de la nombro da ricevitaĵoj “promesoj”. La projekto eklingviĝis, kaj la pseŭdonimo de la aŭtoro iom-post-iom iĝis ĝia nomo — Esperanto.

Kvankam Zamenhof skribis en la Unua Libro, ke li dum unu jaro eldonos nenion en la nova lingvo, li jam en januaro 1888 publikigis ĉe Ĥaim Kelter *Duan Libron de l' lingvo Internacia. Kajero №1* por resumi kaj respondi la ricevitaĵojn.

de **Aleksander Korĵenkov**

Ĉi tiu teksto unue aperis en La Ondo de Esperanto (2008, №2), kaj poste en la artikolaro Dek libroj, kiu estas la unua volumo en la libroserio Nia trezoro de Sezonoj.

Fonto: La Balta Ondo <https://sezonoj.ru/2020/07/unua>

Linga Diverseco

La lingvoj en la mondo havas tre grandan diversecon inter si. Kelkaj homoj eĉ ne konscias nek kredas, ke en aliaj kontinentoj oni havas lingvojn, kiuj diras la samon kiel la eŭropanoj sed en tute malsamaj formoj neimageblaj de la eŭropanaj. Ekzemple ili povus renkonti afrikan lingvon kiu por nia “I would travel to Namibia if I had the money” diras “Namibio se mono estas eble kun mi mian viziton ricevi -us sed la mono ne loĝas ĉe mi”.

Ĉar Zamenhof faris Esperanton en la komenco precipe por la eŭropanoj, li adaptis la gramatikon de sia lingvo al tiu de la eŭropaj lingvoj. Tio estas unu kaŭzo kial ni trovas nian lingvon tiom facila. Sed la gramatiko de la eŭropaj lingvoj ofte ne taŭgas por lingvo kun logikaj reguloj. Tamen Zamenhof kreis Esperanton preskaŭ tute kiel eŭropa lingvo, por fari Esperanton facile lernebla. Konsekvence ĝi ne estas facila lingvo por multaj aliaj popoloj, ekz. la ĉinoj. Tio ne neniigas la fakton, ke eŭropa lingvo ofte esprimas la transigatan bildon pli ekzakte kiel pluraj neeŭropaj lingvoj. Malgraŭ tio eŭropano trovas ofte malfacila lerni alian eŭropan lingvon, ĉar ili ĉiuj evoluis malsame kun malsamaj vortoj kaj malsamaj esceptoj al la gramatiko.

-- el novaĵletero Aŭstraliaj Esperantistoj

Gramatikaj reguloj kiuj estas pli-malpli samaj aŭ similaj en ĉiuj eŭropaj lingvoj estas, ke ili parolas en frazoj kaj ke la frazoj konsistas el frazpartoj kiuj havas malsamajn gramatikajn funkciojn en la lingvo. Ili ĉiuj distingas inter substantivoj kaj verboj kaj adjektivoj k.t.p. Ankaŭ la t.n. verbsistemo estas universa, tamen kun kelkaj gravaj esceptoj.

Zamenhof prenis sian gramatikon el precipe la eŭropaj lingvoj, sed devis decidi ĉe malsamaj. Por ne konstrui Esperanton tro malfacila por la eŭropanoj, li kelkfoje uzis mallogikan regulon, dolĉigante tion per la uzo de reguloj sen esceptoj. En la verbsistemo, li uzis la logikajn regulojn havi unu vorton por unu ago en plejmultaj kazoj, escepte por la Pasiva Voĉo, kie li uzis la duverban formon de pluraj eŭropaj lingvoj: “La viro BATAS”, sed “La hundo ESTAS BATATA”. Kie Zamenhof uzis la unuverban formon, estas ĉe la Futuro, kie li kuraĝis krei “Ni MANGĜOS kune” anstataŭ ekz. la angla “We SHALL EAT together”.

de **Marcel Leereveld** el Aŭstralio

Fonto: **Aŭstraliaj Esperantistoj** AE-498

28>> valorajoj.

Dum mia tuta vivo mi dankemos pro ĉi tiuj klarigoj, vojmontroj, pro la multaj intimaj paroladoj, ĉar plenkreske kiel patro al sia filo ankaŭ mi povis transdoni tiujn same. Li instruis min ŝati saĝe la naturon, la hungarajn pejzaĝojn. Laŭ mi, nuntempe la junularo devus vivi same, por ke tiu povu heredigi la

bonajn aferojn al sia estonta posteularo.


Esperantigis: László Pásztor, Miskolc. en Junio 2011.

sendis Adrienne Pásztor el Hungario

Bonaj skribiloj!
Kiu vi elektos? Ĉu
ruĝa, nigra, aŭ...?
Ili solaj ne agas -
serĉas laboremulon.

Al la patrinoj
neniam ja sufiĉas
libera tempo.
Kion ĝi pensas aŭdi
I 'kriojn? Ĝia kor' ĝenas...

Interesa foto,
feliĉa ricevanto...
Solvu la taskon -
unu viro, du glasoj...
Kiom da homoj drinkos?



Arbara aventurado

sendis Adrienne Pásztor el Hungario

Pli aĝaj familianoj de nia familio multe pli facile travivis la translokiĝon, de la ebenaĵa vilaĝo Békés al urbo Miskolc, ol mi. Mia malnova, malaperinta regiona vivo iĝis ŝajne pli malproksima, ol la distanco inter Makó kaj Jerusalemo, ĉar la nova, nekonata urba ĉirkaŭaĵo iĝis deprima por mi.

Hejmenirante post mia vilaĝa somerumo, miaj gepatroj konstatis perĝoje la okulfrapantajn ŝanĝojn ĉe mi; miajn rozvangojn, ridajn okulojn, freŝiĝintan vivemon. kaj bonan apetiton.

Ili ankaŭ tion rimarkis, ke somerpasante komence de la lernoĵaro mi denove iĝis pesimisma, ĉar iĝis deprima por mi la monotone movmanka urba vivo.


Do, miaj bonaj gepatroj pridecidis aliigi tiun ĉi stacion dirante, ĉar tutnature estas, ke la kelkdekjaruloj kaj tiel same ankaŭ mi bezonas multe da movoj, do ili devas helpdoni al mi ankaŭ ĉirilate. Mia patro aĉetis turistikarton pri la montaro Bükk, kaj alikarton de la turistdomoj de nia montara regiono. Poste li faris monatan ekskursplanon, planite pli longajn-mallongajn ekskursojn por ni.

Tiutempe la lerneja instruo okazis de lundo ĝis sabatagmeze. Pro tio foje okazis, ke ni ekiris ekskursi jam sabatposttagmeze kaj hejmenalvenis dimanĉe vespere. Aliam de dimanĉ-mateno ĝis tiu vespero ni ekskursis en arbaroj de montaro-Bükk, ĝuinte la ozonriĉan senfuman kaj senpolvan aeron. Mia patro volis, ke mi ekkonu, ekŝatu krom la ebenaĵaj areoj ankaŭ la arbarajn la montajn regionojn, ja ankaŭ ĉi tiuj estas partoj de nia hungara patrujo. Mi malkovris ankaŭ ke li same bezonas por promeni en arbaroj, enspiradi la senfuman bonan aeron, kaj ripozi, ĉar post la tutsemajna laboreja kalkulado /ĉeflibrotenisto estis / povesperoj li devis helpi min por solvi miajn lerneĵajn

matematikajn taskojn. Li klopodis komprenigi al mi ne facilan matematikan instrumaterialon. Pro tio la ellernado de la hejmaj taskoj daŭris preskaŭ ĉiutage ĝis noktomezo, aŭ plu. Sekvamatene denove komenciĝis por li la oficeja laboro, por mi la lerneja lernado.

Plej ofte mia patrino preparis lardon /por rosti sur rostostangoj/, panon, cepon, kapsikon, kelkfoje pogaĉon kaj dolĉan sukeraĵon por kunporti al la ekskursoj. Tiujn ŝi enmetis en niajn dorsosakojn kiel manĝaĵojn kaj ankaŭ du ladbotojn da teoj por trinki.

Ĝis elirpunktoj de niaj ekskursoj ni ofte veturis per aŭtobuso, per tramo, kelkfoje per la arbara mallarĝspura trajno de Lillafüred. La arbara trajno tiutempe ekiris de Placo-Esperanto, kie estas la monumento je memoro pri la Miŝkolca inundo de la 1878 jaro kaŭzita de la rivereto-Szinva. Ĉi tiun fervojan finhaltejon post iom da tempo oni alilokis pli malproksimen, apud konstruaĵo de Observatorio. Travivaĵo estis ĉiam la vojaĝo per tiu ĉi trajno. Dum veturado videblis la Paperfabriko de Miŝkolco, la viadukto, kaj la tunelo /en kies malhelo permesatas kisi/. Post la lasta, la trajno alvenis al la bonetosa etfervoja stacio de Lillafüred. Post plua tunelo, sekvis unu malpli granda viadukto, sub kiu fluetadas la akvo de la sur montoflanko fontanta Esperanto-fonto, en la lagon-Hámori, kiu etendiĝas n la apudfervoja valo. Ĉe bordo de la lago staras la Palaco-Hotelo, kiun oni komencis konstrui en 1927, kaj miaj gepatroj estis la unuaj nuptovojaĝantaj gastoj kiam la Hotelo estis inaŭgurita. La legendo ligiĝanta al la lago, laŭ kiu Jesuo donacis fiŝon al iu malsukcese fiŝkaptanta malriĉulo, ĝojigis min. Post la etviadukto nia trajno alvenis al la



Trutedukejo, kie eblas aĉeti truton por baki hejme. Preterlasante la lagon-Hámori ni alvenis baldaŭ al la haltejo-Praa Fandforno. Tie videblas la fandforno el la jaro 1771, en kiu oni fandis estrite de Frerderiko Fazola la ferercojn kaj gajnis feron. Oni metis iaman kromproduktaĵon de la ferfabriko inter la fervojajn trabojn. Ankaŭ nun mi gardas kiel memorojn du pecojn da tiuj verdaj-blujaj ercoj, kiuj enhavas ankoraŭ iom da fero.

La trajno tre malrapide progresis antaŭen puŝblovante fumon, kaj tiam mi aŭdis la ŝercajn demandojn de mia patro: „Kion diradas puŝblov-fumante la lokomotivo klopodante supreniri sur la monton?” La sekvan respondas: ”Helpu Dio!” Helpu Dio!” Kaj kion ĝi diradas puŝblovante rulante malsupren?” La sekvan ĝi diras: „Se vi helpas, aŭ se ne, subeniras mi sole!” Tiujn infanajn onidirojn mia patro ŝerce menciadis. „Jes, la lokomotivo irante malsupren, jam fanfaronas.” Kiel la aliaj infanoj, ankaŭ mi ĝuis pertrajne veturi en la ombraj arbaroj. Mi ŝatis la grizajn vertikalajn trunkojn de la fagoarboj kaj la verdajn pinojn. Mi ensuĉis acerban odoron de la sekfoliaro kaj karakteran odoron de la fungoj.

Alveninte al Garadna, al la finhaltejo de la arbara trajno, mi havis ege grandan ĝojon, ĉar ekvidis stalon da ĉevaloj. Tiutempe la arbaraj vojoj estis mallarĝaj ankaŭ en lokoj de la arbohakadoj. La ĉevaloj tiris per ĉeno la dehakitajn arbotrunkojn de la montoflankoj ĝis la arbara trajno, de kie la trajno liveris la lignomaterialojn al meblofabriko de Miŝkolco, sed ankaŭ la konstruindustriaj firmaoj, minejoj kaj la ferfabriko krom la loĝantara hejtligna provizo. Nuntempe nur kelkaj ĉevaloj vivas tie, ĉar post la politika reĝimŝanĝo ĉesis funkcii la minado, la meblofabriko kaj la konstruindustriaj firmaoj. Pro evoluo de la tekniko, kaj disvastiĝo de la modernaj maŝinoj, ĉi tie oni ne bezonas jam pli multajn ĉevalojn.

De Garadno ni perpiedis sur promenadoj, kie turistsignoj montris la vojdirektojn, aŭ al ruinoj de paŭlana klostro de Szentlélek /Sankta animo/, aŭ al la skitereno de Bánkút, aŭ al Csipkés-kút. Sur la pli lasta teritorio, la plej bona ĉevalaro, tiu de Lipica paŝtas. Krome foje ni transiris la montaron-Bükk, kaj faris viziton en Szilvásvárád; ankaŭ ĉe la Vualo-akvofalo, admiris la lagon de trutoj. Ni suprengrimpis al la groto de la prahomo, kiu troveblas sur Istállós-kő /959 m/.

lukaze dum nia ekskurso ni ekvidis pomarbon sur arbara maldensejo. Mi ne volis kredi la vidaĵon! Ĉu vere pomarbon mi vidas en la montaro-Bükk? Sed la vidaĵo ne estis sonĝo. De la branĉoj ruĝaj pomoj pendis kaj allogis nin. Sub la pomarbo multe da verdaj pomoj kuŝis dise-mise. Mia patro plukis pomon de la arbo, kaj mordis en tiun. La frukto freŝe ekkrakis interdentojn,

kaj ties suko ekŝprucis de lia lipo al mentono. Ĝi ne estis acerba, kiel ĝenerale la sovaĝpomoj. Ĝudona estis ĝi. Poste mia patro vokis min reiri en la arbaron por daŭrigi nian promenadon. Sed mi pensadis iomete ankoraŭ, ĉu mi prenu unu pomon de la tero, aŭ ĉu mi plie prenu pomon de la pomarbo. Kliniĝante suben ni sentis fortan odoron de la fermentiĝantaj pomoj. Ekstare post rigardo de la pomoj, subite pro la timo mi iĝis preskaŭ ŝtonstatuo. De alia flanko de la pomarbo brue antaŭeniĝis apraro. Kvar bestoj estis! Kaj ili kaj mi surpriziĝis. Unu foje ili repuŝiĝis, poste venis iom pli proksimen, haltis kaj rigardis min. Ankaŭ mi rigardis ilin. Mi ne kuraĝis movi min.

Kion fari, mia Dio? – trafalmis mian cerbon kaj venis tuj la sekva penso. Filon de nia reĝo Stefano la Sankta, princon Emerigon kaj Nikolaon Zrínyi mortigis unu virapro. Kio okazus, se....?

Poste mi rememoris avertojn de mia patro por fari neniam rapidan nepripensitan movon, ĉar ĝi povas esti incito por la besto, kaj mi ne montru timon. Mi sciis, ke mi ne forkureblas kaj ne kriblas al mia patro. Ĝis mi rigardis mian ŝuon pene meditante pri kionfareblo, ŝvitis, dume rimarkis antaŭ mi malfruan floron de leontodo. Malrapide mi inklinis al tero, deŝiris tiun, poste rigardis la sovaĝbestojn kion ili faras. Tiuj atentis min. Eble ili atentis ĉu mi volas forpreni iliajn pomojn aŭ ne. Mi ekstaris, la floron metis en butontruon de mia jako. Kvankam miaj manoj – piedoj tremetis, sed tio sukcesis. Poste mi deŝiris de la arbo unun folion kaj komencis frotadi inter miaj fingroj kaj flaradis, montrante, mi ne timas ilin. Poste mi turnis min kaj konforme ekiris al la arbaro. Unue mi paŝadis ŝanceliĝante pro la timo, sed ĉar aŭdis dume, ke la aproj ekmanĝis ŝmacmaĉade, foj-foje porkoblekante, mi trankviliĝis. Mia patro prilaudis min pro mia memregado. Pli malfrue mia patrino notis, ke ĉi tio estis mia unua provo estiĝi viro. Tiam mi estis dekdua.

Post mia aventuro kun la aproj, ni rostis sur rostostangoj lardpecojn, cepojn kaj sur la varmegaj ŝtonoj baritaj la fajron, ni bakis fungojn kaj terpomojn. Tiuj estis majestaj manĝaĵoj post la granda ektimiĝo kaj donis forton por mi hejmeniri.

Dum niaj ekskursoj mia patro priinstruis min: kiel mi devas konduti, se mi renkontas arbarajn sovaĝbestojn, kiel mi devas bruligi fajron por rosti lardon sur rostostango, kiel ni devas malestigi la fajron, ke ĝi ne disvastiĝu malbonon kaŭzante en la arbaro. Li atentigis min, ke nur el fonto estas permesata trinki akvon, ĉar povas esti, ke akvo de rivereto estas poluciita. Li montris kiuj estas la manĝeblaj kaj la venenaj fungoj. Li montris ankaŭ la manĝeblajn fruktojn de la arbaroj kaj instigis min je defendo de la naturaj

>>26

Vera okazaĵo el la jaro 1958

Ŝnupsi, nia kara fidela griztigrata katino, subite estis mortinta. Verŝajne ŝi mortis pro ratoveneno. La tuta familio funebris kaj nun ŝi devos ricevi decan entombigon. Sed estis vintro, forta frostoj, la tergrundo estis frostata, firme kaj profunde. Tial ni envolvis ŝin en drapon, kuŝigis ŝin en pelvon en nia ĝardeno, ke ŝi tie ankaŭ frostiĝu. Kiam estos varma vetero, tiam ni volus ŝin solene entombigi.

Nun – kiam amata dombesto mortis, tiam spertis tion ankaŭ la bonaj amikoj kaj konatuloj. Se ili estas ankaŭ katamantoj, sendube ankaŭ ili kunfunebrias.

Sed ne ĉiam la funebrado estas vere sincera. Ekzemple nia najbaro Freddy ...

Freddy, kiu loĝis en apuda strato, alloĝinte antaŭ kelka tempo, estis nia familia amiko, ĉar li venis, same kiel nia patro, ĉi tien el Bavario en la orientan rondon de Berlino. Li nomiĝis Fred, ni infanoj nomigis lin Freddy. Li estis societema, aperis kiel gaja, joviala persono, kaj ofte li sidis kune kun nia patro en nia ateliero, volonte ĉe unu glaso da ruĝa vino. Freddy ĝenerale ne estis malinklina je la alkoholaĵo. Li ankaŭ frekventis la kelero-drinkejon en la ĉefstrato kaj tie li havis la plejfortan voĉon, kiun niaj senkulpaj samtempuloj aŭskultis, parte respektplene, parte amuze, parte senkomprene, ĉar li parolis ĉiam en la bavaria dialekto.

Je unu bona vintrotago okazis io tute nekredbla – Ŝnupsi estis for, kune kun la drapo – la malgranda pelvo estis malplena!

Tio ne povas esti! Kiu faris tiaĵon? Tion oni ne povis toleri, nepre ni devis klarigi, kio okazis.

Tuj ni tri fratinoj fariĝis detektivoj. Ni informis niajn amikojn, parencojn kaj konatulojn kaj dissvarmis en nian ejon, spione observante ĉion. Kaj ankaŭ baldaŭ venis la sciigo al ni, kiu estis respondeca pri tiu neimagebla okazaĵo. Freddy!

Li mem elbabilis en sia kelero-drinkejo, kiel li kaŝiris dum la mallumeco en la ĝardenon de sia bona amiko kaj forkaptis la kadavron de katino, kvazaŭ antaŭ lia nazo.

La mireginta publiko demandis, kion li intencus kun la morta besto, li ekklarigis, ke li volus preni la felon kontraŭ sia reŭmatismo, la senhaŭtigantan kadavron pendus al arbon por nutraĝo de paruoj.

Do, nun ni ricevis la respondon! Sed la indigno pri tia perfido kaj la hipokriteco de Freddy – ni poste rimarkis, kun malfruo, lian stultan rikanadon – tio ne lasis heziti nin fari paŝojn kontraŭ li. Ĉio devas okazi

rapide, ĉar ŝajnis, ke li ankoraŭ ne plenumis la abomenan faron.

Freddy havis je la fino de nia strato etĝardenon. Tie verŝajne li kaŝas nian katinon. Do – ni rapidegu tien! Jam estis malfrue je la vespero. La angulparcelo estis ĉirkaŭata per dratreto barilo, sed ĝi estis truhava, tiel ke ni povis trarampi ĝin.

Kaj vere – malantaŭ la malgranda ĝardendometo ni ankaŭ trovis ŝin, ankoraŭ envolvate en sia drapo, kuŝanta en olda zinka bankuvo, kelkaj difektitaj sakoj estis superĵetitaj. En granda triumfo ni hejmenportis ŝin.

Kiam venis la printempo, kaj la tergrundo degeliĝis, ni pretigis al nia Ŝnupsi honorindan entombigon en la rondo de familio, sub granda siringo-arbusto, kaj la neĝboruloj alsonoris.

La amikeco memkompreneble estis finita, kaj Freddy nun estis la familia malamiko. Unufoje li ankoraŭ kontaktis nin – kiam ni ĝuste sidis je la vespermanĝo, montriĝis subite lia rikananta vizaĝo tra la fenestrovitro. Nia patro malfermis la fenestron kaj rerikanis: „Nu, Freddy, ĉu vi denove uzas katon?“

Tio estas pasinta ekde longa longa tempo. Patro, patrino kaj Freddy dormas jam longe en paco en la vilaĝa tombejo, kaj en la ĝardenangulo, kie dormetas nia Ŝnupsi, ekfloras en ĉiu printempo la neĝboruloj.

verkis en la germana, tradukis kaj sendis
Margarete Bastian el Germanio





impresa, naiva, mirinda filmo, kiu estis filmita jarojn antaŭ mia infanaĝo, sed mi havis la ŝancon spekti ĝin en la kinejo. Mi skribis artikolon pri ĝi en ĉi tiu rubriko de Turka Stelo (vidu TS nro: 039).

“La Prezo de Perfido” estis rakonto pri amo kaj eble murdo. De ĉi tiu filmo mi memoras scenon de ekzekutado en gasĉambro.

“La Virino-Buĉisto” estis rakonto inter perversulo, liaj viktimoj, kaj la polico postkuranta lin. De ĉi tiu filmo mi memoras scenon de virina okulo sidanta sur kotona peco.

Memoro refraktas rememorojn same kiel prismo refraktas lumon. Eble mi memoras ĉi tiujn filmojn malĝuste, sed ĉi tiuj imagoj estas sendube bildoj prenitaj de la kinejo...

Kaj fine estas filmo nomata “Traitement de choc”, kiu estis montrita sub la nomo “Ŝok” en Turkujo. De ĉi tiu filmo mi memoras injekcion, sangon, strandon, klinikon kaj la litoscenon de Alain Delon kun Annie Girardot.



Francaj filmoj signifis amon, itala filmoj signifis komedion, usonaj filmoj signifis vakerojn, militon, aŭtopersekutajn scenojn, grandiozecon kaj amon por mi. Jean Paul Belmondo ankaŭ estis unu el miaj plej ŝatataj simpatiaj aktoroj. Mi iris al la filmo “Borsalino” de Delon kaj Belmondo kun mia patro. Tamburpafiloj, feltaj ĉapeloj, aŭtoj de 30-aj jaroj, pafil-kvereloj...

Heroaj scenoj, kiuj plaĉas al knabo.

Kio pri la filmo “Du Viroj en la Urbo”?! Jean Gabin, la blankhara, malgaja, malbonhumora kaj senesprima vizaĝa aktoro! Kune kun la juna Alain Delon. Ĉi tiu filmo havas malĝojan finon. Kiam mi diras Gabin, ĉiam venas al mia kapo malmilda sed patreca bildo. Fine de ĉi tiu filmo, li rigardas kun malĝojo kaj malespero al la junulo (Alain Delon), kiun li ne povis savi de la mekanismo nomata justeco. Mi memoras la scenojn pri Alain Delon, kiam ili tranĉis sian ĉemizan kolumon per tondilo, kiam li trinkis konjakon kaj kiam li estis trenita al la gilotino.

Fanny Ardant por mi estas la plej memorinda, konstanta kaj ankoraŭ vivanta bildo en mia menso el la franca kinejo. Mi spektis la filmon “La Femme d'à côté” (la virino en apuda domo) kun mia patro kiam mi estis adoleskanto. La sceno pri amorado kun la aktoro Depardieu en la garaĝo estas por mi la plej memorinda!

Kio do estas? Kino egalas al amo, sekseco, ekscito, heroeco, rapideco, frakasado! Ĉi tio estis precipe vera por mia infana memo.

La bildoj de la aktoroj, kiuj restis en mia memoro el tiuj tagoj estas la jenaj: Lee Marvin kun la plata nazo; Bud Spencer kun la barbo kaj granda ventro; Terence Hill kun la bluaj okuloj; Lee Van Cleef la malbelulo, kun sarkasmaj rigardoj kaj oblikvaj okuloj; Claudia Cardinale, kiun mi vidis de pli proksime ĉe la Istanbula Filmfestivalo jarojn poste; Omar Sherif kun liaj sulkiĝintaj kaj kontuzitaj okuloj, Florinda Bolkan, kiu onanis karesante ŝian nudan korpon, kaj kiun mi spektis en filmo kune kun Omar Sherif; Raquel Welch; Sean Connery kaj Roger Moore, du malsamaj aktoroj, kiuj pentris la sarkasman portreton de James Bond – la duan mi trovis pli ĉarman; la karisma Clint Eastwood; kaj multaj aliaj aktoroj, kiujn mi ne povas nun memori!



Mi aldonu al la listo la “Insecto de amo, Herbie” (Lovebug Herbie), la filmo-serion de blanka Volkswagen aŭto kaj ankaŭ la filmojn de Louis de Funes, pri kiu mi tiel multe ridis.

Post la filmoj, kiujn mi spektis kun mia patro aŭ >>>

S-ro HOSHINO Tomihiro naskiĝis en la gubernio Gunma en Japanio en la jaro 1946. Li finis la kursojn de universitato kaj fariĝis la instruisto de mezlernejo en la jaro 1970. Saman jaron en la gvido de eksterklasa aktivado, li defektis sian kolostan medolon kaj perdis la liberon de membroj. En la hospitalo, li komencis skribi kaj pentri per lia buŝo je la jaro 1972. Li recevis bapton en la malsanula ĉambro.

En la jaro 1991, "Tomihiro Arta Muzeo" estis malfermita en lia naskiĝloko.

Depost, tra la mondo lia "ekspozicio de floraj poemoj kaj pentraĵoj" grande emociis.



"Vojaĝo de vento"

En pasinta jaro vidinte skuiĝitan herbon de vento, mi pensis la malfortecon. Hodiaŭ vidinte skuiĝitan herbon de vento, mi konis la fortecon.

En la matena lumo enradianta tra breĉoj de ĵaluzio, la dua butono dividis en ses partoj.

Tiam mi estis observinta la misteran scenon de la petalo kiu grade estis retrofleksanta silente, mi sentis fiereca la penson, ke nu ni provu pentri la floron.

Sed mi nun sentas peti la floran bonvole doni al mi ŝancon pentri vin.

Mi sentas pli proksime al feliĉo kiam maĵojo amasiĝas ol kiam ĝojo amasiĝas. Mi sentas pli proksime al vero kiam malforteco kunvenas ol kiam forteco kunvenas. Mi sentas pli proksime al amo kiam malfeliĉeco kuniĝas ol kiam feliĉeco kuniĝas.



St. Francisko de Asizo "preĝo peti pacon"

Dio! Faru min la komisiito de via paco!
 Bonvolu helpi kaj konduki min,
 ke mi povu alporti permesecon kie malameco estas!
 ke mi povu alporti unuiĝecon kie disiĝeco estas!
 ke mi povu alporti kredecon kie dubeco estas!
 ke mi povu alporti verecon kie erareco estas!
 ke mi povu alporti esperecon kie malespereco estas!
 ke mi povu alporti ĝojecon kie maĵojeco estas!
 ke mi povu alporti lumecon kie mallumeco estas!

Dio! Bonvolu min esperi, ke mi konsolas ol estas konsolata,
 mi komprenas ol estas komprenata, amas ol estas amata!

Bonvolu funde konvinkiĝi, ke mi unue trovus mem kiam mi nur forĵetus min,
 ke mi unue estus pardonita kiam mi nur pardonus alian,
 kaj ke mi unue reviviĝus al eterna vivo kiam mi nur mortus.

tradukis kaj sendis **Kacu Matoba** el Japanio

>>> familie ni kutimis manĝi turnkebabon aŭ pita-picon en Pampam rapidmanĝejo. Vere tre bongustaĵoj! Precipe la buterlakto kaj en la sandviĉoj la pikloj kaj terpomoj!... Kaj la glacia dolĉaĵo "Frigo" dum la interaktoj! Nur pro ili mi ŝatus iri al la kinejo.

Kiam mi estis 9-jaraĝa, mi tre deziris du aferojn: La unua; posedi luphundon. Ĉar en la filmoj de la huna heroo Tarkan, li havis kompanion de hundo nomata Kurt (lupo). Kaj la dua; posedi kameraon. Mi volis fari filmon. Neniu el ili realiĝis. Nu, se mi havus kameraon, kion farus infano en tiu aĝo, kion mi filmus? Kiu scias!

Tamen mi ne forlasis mian amon al kino kaj luphundo.

Mia patro foriris al la kino de la eterneco kaj restis ĉe mi la memoroj de la kino de ĉi tiu

mondo!
 Vivu Fanny Ardant, vivu la kino!

Konuralp Sunal
 24 junio 2021
 Büyükkada, İstanbulo, Turkio



Solvo de la krucvortenigma

MAL	LE	VI		AD	RIA	TI	KA
SA	ĜO		KO	MO	DO		ME
ĜU		BE	LO	NO		O	RU
LO	ĜAN	TA	RO		BA	STO	NO

Kristnaska skriba meditado de Daĉjo

Jana Holcová Mělník

Delonge mi pensis kiel lernanto de la unua kaj dua klaso, ke la hejmo estas panjo, paĉjo kaj infano. Poste mi eksciis, ke al la hejmo povas aparteni ankoraŭ pluaj vivaj estaĵoj, kiuj bezonas la saman prizorgadon kaj amon kiel infanoj.

Tial en mian hejmon eniris ĝungarska hamstreto Martinek kaj antaŭ nunjaraj kristnaskaj festoj karpeto Peĉjo. Mi vidis ĝin en granda kuvego, kie ĝi malkviete naĝis inter aliaj nombraj karpetoj. Ĝi estis malgranda kaj tre vigla kaj miaj okuloj renkontiĝis kun ĝiaj. Do, venu amiko, ĉe ni hejme plaĉos al vi certe. Kuvon vi havos nur por vi, mi ŝatos ne uzi duŝon por mi, mi lavos min nur en la lavujo.

Mi ekkonsciis, ke se ni estas hejme pli nombraj, mi havas malpli da tempo por pensi nur pri mi mem kaj en mia kapo svarmis aliaj ideoj. Ekzemple, ke nia hamstreto Martinek ŝatus vidi sub la kristnaska arbeto novan kaĝeton por pli bela vivo. Tian dometon kun multaj spacoj en kelkaj etaĝoj, kun glitvoĵeto kaj kun multaj grimpejoj, kie ĝi povus vere petoli.

Al la zorgoj pri la hamstreto aldoniĝis zorgoj pri karpeto Peĉjo. Ĝi bezonis ofte freŝan akvon en la kuvon, eble ankaŭ ion por la dentoj – se karpetoj iajn dentojn havas, ĝis nun mi tion ne sufiĉe esploris.

La karpeto ĉiam allogis mian atenton tiom forte, ke ni ĉiuj – panjo, paĉjo kaj mi – staris en la banĉambro ĉe la kuvo kaj forgesadis kuiru, baki kaj ordigi loĝejon. Amiko karpeto alportis en la antaŭkristnaskajn tagojn grandan ĝojon kaj eksciton. Pro tio mi al ĝi promesis, ke ĝi ne finiĝos dume „malavara vespero“ sur teleroj. Ĝi certe ne povis longe en nia bankuvo vivi kaj ankaŭ ni ne povis ĉiam nur plaŭdi en la lavujo. Mi decidis doni al ĝi novan hejmon en estinta sablominejo Baraba, kiu estas nun plena da akvo por bani kaj naĝi. Tie ĝi trovos novajn karpetajn amikojn. Kaj kiam somere mi naĝos en Baraba, eble ĝi frotetos miajn kruojn kaj tiel mi ekscios, ke ĉio estas en ordo kaj ĝi ŝatas rememori sian restadon en mia hejmo.

Decembro 2003, Mělník, Ĉeĥio

Popolnaturkuracistino Skokovská bába – avulino el Skokovy



Laŭ rakontado de memoruloj kaj laŭ diversaj skribaj fontoj kompilis Eva Pánková, dokumenton esperantigis

Jindřiška Drahotová

SinJORINO Klotylda Hanušová-Hoppeová naskiĝis la 3-an de junio 1843 en Kyšperk (Letohrad) en Bohemio. Ŝiaj gepatroj estis honestaj kaj estimataj homoj. El iliaj nombraj infanoj restis nur unu filo kaj Klotylda. Kiam Klotylda estis kvarjara, mortis ŝia patrino kaj post duono jaro la patro. Plue ŝi vivis malgajan vivon ĉe parencoj. Pli poste, kiam ŝi ŝanĝis loĝejon, ŝi laboris ĉe la familio Dittrich. La vivkondiĉoj por ŝi pliboniĝis. Sinjoro Dittrich estis profesie konstruisto de fervojo, do tre ofte la familio ŝanĝadis loĝejon kaj Klotylda ekkonis Bohemion, Moravion, Silezion, Hungarion, Germanion. La infanoj de sinjoro Dittrich instruis ŝin legi kaj skribi. Ŝi neniam vizitis lernejon, sed post la laboro ĝis malfrua nokto ŝi legis religiajn, natursciencajn kaj fakajn librojn.

De la infaneco ŝi observadis la naturon, precipe herbojn. Kiam ŝi estis ankoraŭ infano, ŝi konsilis al maljunulo – astmulo trinki teon el primoloj. Li resaniĝis kaj oni komencis ŝin alparoli „doktorinet“.


Dekokjara ŝi en Leipzig (Lepcigo, Lipsko) laboris en privata sanatorio. La posedanto konstatis ŝian eksterordinaran talenton kaj elektis ŝin sia kunlaborantino. Dum operacioj ŝi studis anatomion kaj la difinon de diagnozo. Post naŭ jaroj pro malakordiĝo kun kuracistoj ŝi forlasis la sanatorion kaj translokiĝis al Heida (Nový Bor). Ĉi tie en propra loĝejo ŝi aranĝis por la fabriko de sinjoro Pistoř desegnaĵojn sur vitro. Ŝi bone profitis per tiu ĉi okupo. Dum tempo ŝi konatiĝis kun Albert Hoppe kaj edziniĝis al li. Hoppe, la direktoro de la fabriko dungadis kelkajn pentristojn kaj knabinojn. Komune ili laboris en la fabriko de sinjoro Pistoř dum dudek kvin jaroj. Krom tio ŝi estis ofte serĉata de malsanuloj por konsilo kaj helpo.

El Heida ŝi foriris al Teplice, kie ŝi laboris dum unu jaro kiel privata masaĝistino.

La direktoro de bienoj en Březno eksciis pri ŝi de popola rakontado. Li invitis ŝin loĝi en Lhotka apud Březno. Ĉi tie ŝi malsaniĝis tre grave. Ĉe la frato ŝi

>>12

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds